Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 54 - trimonata
2024/4

IPR

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
R. Fernández Asensio
Laura Brazzabeni
Zsófia Kóródy
Ilona Koutny
Aranka Laslo
Alessandra Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Aime Patrick Manirakiza
Henri Masson
Joel Muhire
József Németh
Danijela Petrović
Radojica Petrovič
Emmanuelle Richard
Blazio Vaha



30 jaroj 120 numeroj

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
30 jaroj 120 numeroj (József NÉMETH, Alessandra MADELLA) 4
Ilona KOUTNY: *Memorkonferenco okaze de la 100-jara jubileo de I. Szerdahelyi* 6
Ilona KOUTNY: *István Szerdahelyi – ĝisosta pedagogo* 8
Zsófia Kóródy: *Lerneja instruado de Esperanto en la tempo de Szerdahelyi kaj nun* 12
Balázs Wacha: *Malfruan dankon al majstro Szerdahelyi* 16
Alessandra MADELLA: *Eldoniĝis la Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23* 18
Ilona KOUTNY: *La Interlingvistikaj Studoj en AMU finis sian agadon* […] 22
Radojica PETROVIĈ: *Interkulture kaj inkluzive en Beogrado* 25
Danijela PETROVIĆ: *Tra brajlo kaj muziko al la mondo* 27
Alessandra MADELLA: *Kion la Japana-Korea Kongreso alportis al instruistoj* 29
El la landoj kaj sekcioj (BE, BI, FR, DE, CD, RS) 32
Henri MASSON: *UNESKO kaj Esperanto* 39
Rubeno Fernández ASENSIO: *Pasinteco kaj estonteco de la Eo-kursoj en UNED* 44
Redakciaj informoj kaj informoj pri ILEI 48-49, 55
Alvoko partopreni en la 58-a ILEI-Kongreso kaj Simpozio (LKK, Brazzabeni) 50

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Estrarano: Aime-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: 30 jaroj 120 numeroj (*vd. p. 4*)

Dorskovrile: La vasta parko Kalemegdan en Beogrado, nia kongresurbo en 2025 (*vd. nian alvokon sur p. 50*)

Enkonduko

Karaj legantoj,

En ĉi tiu numero de IPR, ni havas plurajn motivojn por ĝoji kaj rememori gravajn eventojn, kiuj markas la viglan vivon de nia komunumo kaj la Ligo. Unue, ni donas grandan dankon al nia longtempa ĉef-redaktoro, Jozefo Németh, kiu dum 30 jaroj gvidis la revuon. Sub lia sagaca zorgado, IPR evoluis kaj floris, ĉiam reflektante niajn aprezindajn atingojn. Mi petis lin verki pri tio ĉi-numere por pli sciigi al ni pri siaj valoraj spertoj.

Ni ankaŭ rememoras prof. István Szerdahelyi, la fondinton de la Esperanto-fako ĉe la ELTE-universitato, okaze de lia 100-jara jubileo. Li estis pioniro en la kampo de esperantologio kaj interlingvistiko, kaj liaj laboroj daŭre influas la universitatan mondon. Kiam mi vidas kiel liaj disĉiploj tiel ame kaj estime rakontas pri li, mi ne povas ne envii ĉu pri li, ĉu pri ili.

Krome, ni esploras la interligon inter Esperanto, muziko kaj brajlo, kaj gajiĝas pri la novaj eldonaĵoj de ILEI, inkluzive de la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23*, kiu dokumentis gravajn prelegojn de la pasintjaraj simpozioj.

Fine kaj plej fiere, ni gratulas al Zsófia Kóródy, kiu ricevis altan ŝtatan distingon pro sia laboro por reciproka kompreno kaj demokratiaj valoroj – kaj la kreado de Herzberg kiel Esperanto-urbo.

Mi esperas, ke la enhavo de ĉi tiu numero de IPR instigos vin pensi pri la riĉeco de nia komunumo kaj la graveco de nia laboro kune.

Ahmad Reza MAMDUHI

30 jaroj 120 numeroj

Jubileoj

Denove pasis 5 jaroj en la vivo de ILEI kaj en la vivo de IPR. En 2019 ILEI iĝis 70-jara kaj en la sama jaro, en la numero 2019/4 nia redakcio rememoris tiujn 25 jarojn, kiujn mi pasigis sur la redaktora seĝo. Intertempe ILEI iĝis 75-jara, kaj mia redaktora laboro 30-jara. Kun la numero 2024/4 fermiĝas la 54-a jarkolekto de la nuna serio de IPR. Tiu ĉi serio komenciĝis en 1970, kiam mi estis 10-jarulo. En 2025, en la jaro de la 55-a jarkolekto, mi iĝos 65-jara, emeritiĝos; espereble mi havos pli da tempo por Esperanto kaj ILEI.

En la festa numero 2019/4, mi resumis la historion de la aktuala serio de nia fakrevuo, IPR, ekde la komenco ĝis la jaro 2019 (tiu numero elŝuteblas ĉe: https://www.ilei.info/pdf/IPR19.4.reta_print.pdf). Pliajn detalojn pri ĝia historio vi povas trovi en la arĥivo de la revuo kaj en la prezentaĵo, kiun mi kompilis por nia Kongreso en 2022 (https://www.ilei.info/revuoj/IPR-prelego.pdf).

Titolpaĝe de la numero 2019/4, antaŭ 5 jaroj, aperis foto pri mi. La ideo de tiu titolpaĝo venis de Luiza Carol, kaj la grafikan aranĝon faris ŝia filino. Por rememori la 30-jariĝon la estraro proponis, ke mi aperu tie denove, do, mi faris foton, kiun poste iom prilaboris mia filo.

Statistikoj

Apud mia kapo sur la nuna titolpaĝa foto vi vidas 119 paperajn numerojn de la lastaj 30 jaroj de IPR. Ili pezas 7384 gramojn, okupas 30 cm-ojn en la librobreto kaj kune kun la nuna numero ili enhavas pli ol 5 mil paĝojn! (Provu rekalkuli, mi kalkulis 5056 paĝojn.) Unu numero, kun 11-a litergrandeco enhavas pli ol 10 mil vortojn, tio signifas, ke dum tiuj 30 jaroj naskiĝis fakmaterialo kun minimume 1 200 000 vortoj. (Verŝajne multe pli, ĉar en la pli fruaj jaroj ni aperigis malpli da fotoj, kaj ni uzis malpli grandan literaron.)

Antaŭ tiuj 120 numeroj de mia redaktora periodo aperis ĉ. 75 numeroj (kun kelkaj duoblaj numeroj, do, sume preskaŭ 200), t.e. sume, la aktuala serio enhavas pli ol 2 000 000 vortojn.

Kunlaborantoj

Komence de 2020 Luiza Carol, post 12-jara laboro, informis la redakcion, ke pro okulproblemo, ŝi ne plu povas provlegi la numerojn, pri tio informis la legantojn Mireille Grosjean, en la numero 2020/2. Feliĉe, ekde la numero

2020/3, nia redakcio kompletiĝis: eklaboris en ĝi Ahmad Reza Mamduhi, unue kiel lingva revizianto, kaj ekde la numero 2021/3 li partoprenas ankaŭ en la decidoj pri la enhavo, ja en 2021 li iĝis Prezidanto de nia Ligo.

Same ĝojige, Mirejo akceptis mian peton, ke ŝi restu en la redakcio. Ŝi daŭre helpas per konsiloj, per verkado aŭ akirado de artikoloj. Ŝi ekde 2025 lanĉos novan rubrikon en IPR kun la nomo „Tra miaj spertoj".

Mi nepre danku al Luigia Madella kaj Rob Moerbeek, kiuj fidele helpas mian laboron, provlegante la tekstojn. Luigia Madella estas redakciano ekde 2004, Rob Moerbeek ekde 2006, Mireille Grosjean ekde 2013. Dankon ankaŭ al TEJO, kiu helpas la komunikadon inter IPR kaj Rob. Ene de la estraro, krom de Ahmad Reza Mamduhi, mi ricevas multe da helpo de Alessandra Madella, dankon ankaŭ al ŝi.

Arĥivo de IPR

Krom la redaktado de IPR, mi zorgas pri la aktualigo de la retejo de ILEI. IPR pli frue havis memstaran retejon, kiun mi konstruis en aparta servilo, kaj kiun poste mi enkonstruis en la retejon de ILEI. Sed tiun retejon, pro teknikaj kialoj, ne eblis pluevoluigi. Anstataŭ ĝi mi kreis kaj prizorgas la kompletan arkivon de IPR[1], kiu enhavas ĉiujn numerojn, kiujn mi trovis, ekde la jaro 1908. Verŝajne, estas mankoj en la arkivo, bonvenas ĉiuj kompletigoj kaj korektoj.

Alia novaĵo de la lastaj jaroj estas, ke nun ni havas profesian programiston, Cristina Bollini, kiu solvas la eventualajn teknikajn problemojn kaj klopodas modernigi nian retejon. Dankon ankaŭ al ŝi!

József NÉMETH, redaktoro

Dankon al Jozefo

Okaze de la 30-jariĝo de nia revuo IPR, ni ne povas ne multe danki al Jozefo pro lia grandega laboro kaj prizorgado pri ĝi. Danke al li, nun ni havas preskaŭ kompletan traserĉeblan arĥivon, kiu ebligas gravajn esplorojn pri la historio de nia Ligo, kiel la baldaŭ preta antologio de artikoloj fare de Fernando Pita. Danke al li, nia revuo ekvilibre balanciĝas inter klera, scienca parto kaj bunta, movada parto, donante tiel voĉon al ĉiuj niaj animoj kaj ebligante pli persvadan prezentadon al gravaj instancoj, internacie same kiel en diversaj landoj. Danke al li, nia revuo estas ankoraŭ papera, kio donas al

[1] https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php

ni prestiĝon en ĉiam pli cifereca mondo. Kaj fine, danke al li, ĉiun trian monaton akurate alvenas bela revuo kun belaj fotoj kaj tekstoj, kiu provizas per modelo de zorga lingvo-uzo por instruistoj kaj lernantoj. Mi do esperas, ke Jozefo ankoraŭ longe daŭrigos sian laboron por IPR, portante nin al eĉ pli sukcesaj atingoj por la Ligo kaj la tuta Movado.

Alessandra MADELLA, vic-prezidanto de ILEI

Memorkonferenco okaze de la 100-jara jubileo de István Szerdahelyi

de Ilona KOUTNY (Hungario/Pollando)

La Katedro pri Aplikata Lingvistiko kaj Fonetiko de la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd (ELTE) kaj la Interlingvistikaj Studoj de la Poznana Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU, en Pollando) kune organizis tuttagan memorkonferencon en ELTE, la 18-an de oktobro 2024, por rememori pri la agado kaj atingoj de prof. Szerdahelyi (1924-1987), fondinto kaj gvidinto de la Esperanto-fako de ELTE (1966-87), instituciiganto de universitataj instruado kaj esplorado de esperantologio kaj interlingvistiko.

Vicdekanino de la Filologia Fakultato, prof. Judit Bóna malfermis la aranĝon. La lokon de Szerdahelyi en ELTE skizis la estrino de la Katedro pri Aplikata Lingvistiko kaj Fonetiko (posteulo de la iama Katedro pri Teoria kaj Aplikata Lingvistiko), prof. Zsuzsa Vladár, kiu pro malsano ne povis aperi, kaj kies skizon laŭtlegis la ekskatedrestrino prof. Mária Ladányi, kiu poste gvidis la prelegsesion. Prof. Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, disĉiplo kaj iama posteulo de Szerdahelyi, rememoris persone kaj oficiale pri lia internacia rolo kaj legis partojn el la salutvortoj de la gvidantoj de la Akademio de Esperanto, ILEI kaj *Literatura Foiro*. Rememoris pri li ankaŭ Anna Besenyei, iama studentino, nun vicprezidanto de HEA. Ŝi menciis la rilaton inter Szerdahelyi kaj HEA. Partoprenis ankaŭ la filo d-ro Balázs Szerdahelyi kun sia familio vivigante kelkajn interesajn scenojn el la vivo de sia patro. Li parolis ankaŭ pri lia vasta lingvoscio.

Ilona Koutny malfermis la prelegsesion prezentante Szerdahelyi kiel interlingviston kaj esperantologon, montrante kiuj liaj temoj estas vojmontraj ankaŭ por la aktuala esplorado. Ŝi ĵus eldonis libron el kelkaj liaj gravaj artikoloj, kiuj nun estas alireblaj rete[2]. Katalin Horváth, iama kolegino de Szerdahelyi en la Lingvistika Katedro, kiu lernis Esperanton por povi gvidi kurson pri lingvistiko kadre de la esperantologiaj studoj, rememoris pri li kiel homo kaj lingvisto kaj menciis la rolon de Esperanto en lingvistiko. Balázs Wacha (Blazio Vaha), lingvisto, traktis kelkajn esperantologiajn problemojn esploritajn de Szerdahelyi. Li klarigis ilian ĝustecon kaj ilian aplikon en la instruado en la Esperanto-fako. Li atentigis pri lia nefinita disertaĵo pri planlingvoj, kiu meritus publikigon.

Éva Tófalvy, kiu verkas Esperante kaj hungare, komencis la posttagmezan sesion ligante Szerdahelyi 100 kun Szathmáry 50. Ŝi malkaŝis interesajn faktojn el la vivo de la hungara verkisto (1897-1974), kiu verkis ankaŭ esperante. József Horváth analizis la problemojn de la esperanta leksikografio komparante la Hungaran-Esperantan mezan vortaron de Szerdahelyi & Koutny (1996) kun siaj vortaroj, atingeblaj rete. Iván Bújdosó, iama instruisto de la Esperanto-fako, parolis pri Szerdahelyi kiel homo, instruisto, pri liaj verkoj kaj la sorto de la Esperanto-fako, pri signifaj esperantistoj, kiuj elkreskis el ĝi kaj agadas en Hungario kaj internacie.

La lastaj 3 prelegoj koncentriĝis al instruado. Márta Kovács, kiu longe instruis Esperanton en mezlernejo, analizis la 5-landan pedagogian eksperimenton, kiun Szerdahelyi gvidis en la 70-aj jaroj, por pruvi la facilan lerneblecon kaj lernfaciligon de Esperanto. Ŝi menciis ankaŭ postajn similajn eksperimentojn. Ŝi prezentis ankaŭ la prelegon de Zsófia Kóródy (kiu ne povis ĉeesti), motoro de Interkultura Centro Herzberg, pri la lerneja instruado en la epoko de Szerdahelyi kaj nun. Krisztián Horváth, kiu pasintjare doktoriĝis pri lernolibroj de Esperanto en ELTE, analizis la lernolibrojn de Szerdahelyi.

La konferencan salonon plenigis iamaj studentoj kaj samtempuloj de Szerdahelyi, krome aliaj interesiĝantoj. La tagmeza paŭzo kaj la tempo post la riĉa prelega programo ebligis personajn rememorojn de la partoprenantoj pri la studenta tempo kaj la varmkora kaj larĝscia profesoro kia estis István Szerdahelyi. Ni pluiru sur la vojo komencita de li!

[2] https://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/szerdahelyi2024.html

István Szerdahelyi – ĝisosta pedagogo

Okaze de lia 100-jara jubileo

de Ilona KOUTNY (Hungario / Pollando)
Iama disĉiplo (1972-77)
Posteulo (1987-1995)
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj de AMU (1998-2024)



Prof. István Szerdahelyi (1924-1987), iama prezidanto de ILEI (1985-87), ĝia honora membro kaj tiu de UEA, membro de AdE, mallonge redaktoro de IPR, nun estus 100-jara.[3] Lia multflanka vivoverko koncentriĝas al la instruado de Esperanto en diversaj niveloj. Li estis grava esperantologo, interlingvisto, ankaŭ leksikografo [4] kaj ĝisosta pedagogo, kiu kapablis transdoni seriozan materialon en interesa formo al siaj studentoj kaj publiko.

Li eklernis Esperanton en 1949 kaj baldaŭ komencis instrui ĝin. Cetere, en la militkaptiteco li lernis la rusan lingvon, poste studis kaj instruis ĝin. Li verkis gimnaziajn lernolibrojn pri la rusa, el kiuj mia generacio lernis tiutempe. Lia strebado kontribuis al la enkonduko de Esperanto en la hungarajn lernejojn kiel elektebla fremda lingvo en la 60-aj jaroj. Li verkis ankaŭ instruprogramojn kaj lernmaterialojn, kio rezultigis plurajn kursojn en la lando kaj eĉ eblecon de abiturienta ekzameno (*vd. ankaŭ la artikolon de Kóródy sur p. 12*).

Kiel lia plej grava merito konsideriĝas la fondo de la **Esperanto-fako de ELTE** (Eötvös Loránd-Universitato) en Budapeŝto (HU), en 1966 (kun la subteno de prof. Bárczy, konata hungara lingvisto, esperantisto) kaj ĝia gvido ĝis lia frua morto en 1987. Tiel la formado de Esperanto-instruistoj estis certigita. Szerdahelyi ellaboris la studprogramon, similan al tiuj de filologioj

[3] Pro tiu ĉi okazo liaj figuro kaj atingoj estis prezentitaj dum la Danuba Renkontiĝo, ILEI-kongreso, UK, angle dum la Interlingvistika sekcio de la Internacia Kongreso de Lingvistoj. La Katedro pri Aplikata Lingvistiko kaj Fonetiko de la Budapeŝta Eötvös Lóránd-Universitato kune kun la Interlingvistikaj Studoj de la Poznana AMU organizis tuttagan memorkonferencon (*vd. raporton sur p. 22*).
[4] Redaktoro de la Hungara-Esperanta mezvortaro, kiun finis Ilona Koutny (HEA, 1996).

(3-jaran, kun antaŭa unujara enkonduko por lerni la lingvon) kaj la studmaterialojn (lernolibrojn kaj krestomatiojn pri literaturo). Per tio li instituciigis la universitatan instruadon de esperantologio kaj tiel donis bazon al la scienca esplorado pri Esperanto. En aliaj landoj okazadis antaŭe kaj poste Esperanto-kursoj kaj interlingvistikaj kursoj, sed kompleksa instruado kun fina diplomo simila al tio, kio estas por aliaj fakoj, ne ekzistis. Nur ekde 2018 en la Universitato de Zaozhuang (Ĉinio) startis Esperanto-fako en la bakalaŭra nivelo. En AMU unufoje okazis magistraj studoj 2022-24[5].

La programo de la taga Esperanto-fako konsistis el kursoj pri Esperanto, Esperantaj gramatiko, literaturo, movadhistorio kaj interlingvistiko. Dum kelkaj jaroj ekzistis ankaŭ speciala t.n. ***koresponda formo*** (kun regulaj alvenoj de la partoprenantoj), kun pli riĉa programo por instruantaj kolegoj, kiuj jam parolis la lingvon. Szerdahelyi planis ankaŭ internacian Esperanto-fakon, sed ties realigo okazis nur post lia forpaso en la 90-aj jaroj, kiam Zsuzsa Varga-Haszonits kaj Ilona Koutny transprenis la torĉon. Ties tradicio pluvivis en la Interlingvistikaj Studoj de AMU (1998-2024, pri la fino vd. raporton en tiu ĉi numero).



Szerdahelyi István prelegas

[5] Pri la programo mi plurfoje raportis en IPR, laste, pri la fino en IPR 2024/3.

La instruado en la Esperanto-fako okazis kunlabore kun kontribuo de eksteraj lekciistoj kiel Zsuzsa Barcsay (metodiko), Péter Rados (literaturo), Árpád Rátkai (movadhistorio), Balázs Wacha (Blazio Vaha, esperanta gramatiko) kaj Zsuzsa Varga-Haszonits (dum 1975-78 kiel dungito, interlingvistiko). Ankaŭ kolegino-lingvisto Katalin Horváth lernis Esperanton por gvidi kurson pri ĝenerala lingvistiko por la korespondaj kaj internaciaj fakoj.

Szerdahelyi interesis kaj envolvis la studentojn en la sciencan laboron (scienca studenta rondo, redaktado de Esperantologiaj Kajeroj, diplomlaboraĵoj pri diversaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj), samtempe kreante agrablan etoson dum la lecionoj. Pluraj el liaj studentoj agadis kaj agadas nun en la mondo (nur mencii kelkajn: István Ertl, Zsófia Kóródy, Blazio Vaha, Imre Szabó, Jozefo Horváth ...).

István Szerdahelyi verkis ankaŭ **universitatan lernolibron de Esperanto** kun elementoj de ĝia lingvistika priskribo (1972). Li aperigis plurajn artikolojn pri esperanta gramatiko[6] (interalie ankaŭ pri la diskutata problemo de la radikkaraktero, kie li kritikis la akademian aliron) kaj planis sian esperantan gramatikon (IPR 1979/3: 70), por kiu li ne plu havis tempon.

La universitata **lernolibro pri interlingvistiko** aperis en la hungara lingvo (1980). Li planis ankaŭ ties pli ampleksigitan version, sed fine ĝi ne aperis, kvankam li senlace kaj multflanke laboregis. Lia hungara sciencpopulariga verko *Bábeltől a világnyelvig* (De Babelo ĝis la mondolingvo, 1977) diskonigis la lingvan problemon dum la historio de la homaro kaj la solvon proponitan per planlingvoj.

Li ne nur praktikis la instruadon de la lingvo, de esperanta gramatiko kaj interlingvistiko en ELTE, sed li ankaŭ enkondukis siajn studentojn en la profesion de instruisto kaj verkis sian ***Metodologion de Esperanto*** (1975). Tiu universitata lernolibro estis baza verko en la tereno – kvankam ne sufiĉe konata – ĝis la apero de la *Manlibro pri instruado de Esperanto* (red. Katalin Kováts, 2005, 2020[4]).

Szerdahelyi esploris kaj komparis la vortoprovizon de fremdlingvaj lernolibroj. Estis tre grave, ke li povis gvidi la **5-landan eksperimenton** 1971-74 (HU, AU, IT, BG, JU) por pruvi la facilan lerneblecon de Esperanto kaj ĝian lernfaciligon (propedeŭtikon) por la sekva fremda lingvo en

[6] Ĵus aperis kelkaj *Elektitaj artikoloj* de Szerdahelyi (red. Ilona Koutny 2024). Kelkaj liaj artikoloj troviĝas en la IPR-arkivo (https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php).

elementa lernejo. Li engaĝis la tiamajn studentojn en la prilaboron de la datumoj kadre de iliaj diplomlaboraĵoj (Márta Kovács, Anna Besenyei).



De maldekstre: Ilona Koutny, István Szerdahelyi, Zsuzsa Barcsay

Li kunlaboris en la elformo de la 3-grada (A, B, C) ekzamensistemo de HEA kaj pretigis la parton pri metodologio por la *Gvidlibro por Supera Ekzameno,* kiu ankoraŭ nun povas servi studantojn.

La nuna ILEI-prezidanto Ahmad Mamduhi tiel salutis la memor-konferencon Szerdahelyi 100: „Profesoro Szerdahelyi lasis profundan influon kaj postsignon en la mondo de Esperanto-instruado kaj -esplorado. Lia kontribuo al la Esperanto-fako en la budapeŝta Universitato ELTE estas nemezurebla kaj lia influo daŭre inspiras ĉiujn nin. Ni, ĉe ILEI, alte taksas lian dediĉon al la instruado de Esperanto kaj lian pioniran laboron en la kampo de interlingvistiko. Liaj verkoj restas gravaj materialoj por Esperanto-instruistoj tutmonde. Liaj vizio kaj laboroj daŭre gvidas nin en niaj klopodoj antaŭenigi la instruadon de Esperanto tutmonde.”

Jen nur skizo de la instruista agado de prof. Szerdahelyi. Li plenumis grandan laboron por la akceptigo de Esperanto en la eduka sistemo en Hungario. Li batalis por la akcepto de Esperanto en sciencaj rondoj kaj akcepto de scienca esplorado en Esperantio. Liaj entuziasmo, laboremo, persisto kaj kunlaboremo restas vojmontraj ankaŭ nuntempe.

Lerneja instruado de Esperanto en la tempo de Szerdahelyi kaj nun

de Zsófia KÓRÓDY (Hungario / Germanio)
disĉiplo de prof. István Szerdahelyi, studento en la Esperanto-fako de la Universitato ELTE, Budapest inter 1976 kaj 1980
instruisto en Németh László-Gimnazio, la unua 8-studjara mezlernejo, inter 1987 kaj 2003
ĉefkunlaboranto de Germana Esperanto-Centro, Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo, de 2003
prezidanto de AGEI, germana landa sekcio de ILEI

Estas por mi honoro povi paroli pri tiu ĉi temo, ĉar mi ricevis de nia iama, tre respektata universitata profesoro István Szerdahelyi la kuraĝigon kaj la amon al la instruista profesio, la konvinkiĝon, ke instrui Esperanton estas vera defio, bonega sperto kaj samtempe kvazaŭ devo, ĉar ne multaj studentoj elektis tiun ĉi fakon kaj la studado en la Esperanto-fako tiutempe ne rezultigis instruistan, sed tiel nomatan filologan diplomon.

Oni devas substreki, ke en la tiama lerneja sistemo – sekve de la klopodoj kaj persista laboro de István Szerdahelyi – Esperanto ĉeestis en ĉiuj eduknivelo j kiel lerneja lernobjekto kaj kiel fakultative lernebla lingvo. Por tio oni nepre bezonis kvalifikitajn instruistojn, do krom en la Universitato ELTE en Budapeŝto okazis kapabligo de Esperanto-instruistoj ankaŭ en pedagogiaj altlernejoj, ekz. en Esztergom, Sárospatak, Eger, Szombathely. Parolante pri la lerneja instruado de Esperanto, oni nepre devas vidi la unikan strukturon, pri kiu, laŭ mia scio, nur Hungario povas fanfaroni: ekzistis kaj oficiala lerneja instruado de Esperanto kaj samtempe kapabligo de instruistoj por la lerneja instruado.

Ekzistis do instruistoj specialiĝintaj pri Esperanto, eblis instrui Esperanton kiel duan fremdan lingvon kaj en baz- kaj en mezlernejoj, proponi posttagmezajn fakrondojn kaj samtempe tiuj lernejoj kaj kursoj

funkciis ankaŭ kiel praktikejoj por studentoj, estontaj Esperanto-instruistoj, kiuj povis tie plenumi la devigajn lecionojn de la instrupraktikado kaj akiri profesian spertiĝon por la diplomo.

Kion diris Szerdahelyi pri la lerneja instruado? Jen lia devizo: „Klopodu ĉiu instruisto, ke la instruhoro estu kvazaŭ eta didaktika artverko...”

Kio ankoraŭ estis, estas bezonata por la lerneja lingvoinstruado? Jen nekompleta listo: oficiala permeso (dekreto de la Ministerio pri Kulturo/Edukado), instruplano, lernolibroj, didaktikaj helpiloj, demonstrad-materialoj, la sistemo de kontrolo, pritaksado de la scio, ekz. lingvokapablo-konkursoj, abiturienta ekzameno aŭ lingvaj ekzamenoj, pluklerigado de instruistoj, spertinterŝanĝo de profesiuloj, ebloj de lingvopraktikado, korespondado, eventoj, lerneja interŝanĝo ktp.

Sen pretendo je kompleteco, mi ŝatus doni pliajn informojn, revoki memorojn, ekz. pri Zsuzsa Barcsay, kiu multon faris por la praktika realigo de Esperanto-instruado, kies nomo estas nedisigebla de enlerneja lingvoinstruado kaj instruista trejnado.

Jen resumo aperinta en la revuo *Heroldo de Esperanto* (1. februaro 1979) kun la titolo: *La nuna stato de la Esperanto-instruado en Hungario*:


1. En klasoj 1-8 de bazlernejo (por 6-14-jaraj lernantoj), Esperanto-instruado okazis ĉefe en la klasoj 5-8 en fakronda kadro, ekz. en Budapeŝto, Gyula, Eger, Endrőd surbaze de la ministeria starpunkto de 06.04.1976. Bedaŭrinde, eĉ tiam, jam en 1979, oni povis legi pri la malkresko de Esperanto-instruado en lernejoj.

2. En la 1-4-aj klasoj de mezlernejo (por 15-18-jaraj studantoj) Esperanto havis la rajton je eksterordinara, libervole elektebla fako laŭ la ministeria instrukcio n-ro 69/1957.

3. En pedagogiaj altlernejoj, ekz. en Szombathely, Sárospatak kiel fako de la instruista kvalifikado por la 1-4-aj klasoj de bazlernejo, aŭ en Eger, kie okazis kvalifikado de instruistoj por la klasoj 5-8 de bazlernejo.
En la Filologia Fakultato de ELTE Esperanto estis elektebla fako por 3-jara studperiodo por plentempaj kaj korespondaj studentoj.

Jen diagramo laŭ la statistiko de Esperanto-instruado en hungariaj lernejoj inter 1975-2000: kun la escepto de unu aŭ du pintoj, ni vidas ĝeneralan malsupreniĝan tendencon, kiu iom pliboniĝis verŝajne nur pro la granda

nombro da partoprenantoj en lingvoekzamenaj preparkursoj por universitataj studentoj:



Por lingvolernado ankaŭ lernolibroj estis necesaj. Danke ĉefe al la laboro de István Szerdahelyi, ekzistis lernolibroj por ĉiuj niveloj de lerneja instruado. Ekzemple *Esperanto 1* (internacia) kaj *Esperanto 2* (*Lingvo internacia* respektive *Daŭriga kurso*) por bazlernejoj, *Esperanto I kaj II* por gimnazioj, poste ankaŭ lernolibroj kun ekzerckajeroj eldonitaj de la Pedagogia Instituto por fakultativa instruado en la 3-aj kaj 4-aj klasoj de gimnazio.

Post la komenca sukcesa lerneja instruado, ni rigardu ankaŭ la Esperanto-rilatajn instrukciojn de la eduka reformo en Hungario, ekvalidiĝinta en 1980. Laŭ tio en bazlernejo Esperanto povis aperi kiel dua fremda lingvo (laŭ instrukcio de Ministerio de Edukado numero 104/1980, M.K.5. de O.M) aŭ kiel fakultative, nedevige elektebla fakrondo (M.K. 1980.5.sz., p.317-318). En tiu lernojaro mi instruis Esperanton en la bazlernejo de Tomori-strato, kadre de la antaŭtagmeza ĉefa lecionaro.

En mezlernejo, gimnazio Esperanto-instruado eblis kiel libere elektita nedeviga fako laŭ instrukcio de la Edukministerio (numero 117/1982. M.K.15.)

Mi instruis en Németh László-Gimnazio en Budapeŝto inter 1987 kaj 2003 kaj mi ĉiu-jare anoncis Esperanto-lecionojn, tiel la internacia lingvo

estis proponata kiel speciala, libere elektebla nedeviga fako. Miaj studentoj trapasis kursfinan, kelkaj eĉ abiturientan ekzamenon, Esperanto estis inkluzivigita en ilia atestilo. Pluraj lernantoj aparte prepariĝis al la trapaso de ŝtata lingvoekzameno en la KER-niveloj B kaj C, ja post sukceso la akirita atestilo estis agnoskita kiel abiturienta ekzameno. Aliaj lernantoj uzis tiujn atestilojn por ricevi krompoentojn ĉe la akcepto-ekzamenoj de universitatoj.

Lige kun la eduka reformo novaj Esperanto-lernolibroj estis preparitaj por mezlernejoj en 1979-80. Profesoro Szerdahelyi verkis ilin (*Esperanto I* kaj *II*), kaj li estis la aŭtoro ankaŭ de la lernolibroj por la gimnaziaj klasoj III kaj IV, al kiuj apartenis ankaŭ ekzerckajeroj.

Ankaŭ por altlernejoj kaj universitatoj aperis edukministeriaj instrukcioj (MM. 13/1985, X.23.) kaj letero de la ministeria fakestro D-ro János Pusztay en 25 aprilo 1986 (MM. 27193/1986), kiuj permesis Esperanto-instruadon. Apartan atenton meritas la aldonita rimarko: „Esperanto estas konsiderata same kiel aliaj vivantaj fremdaj lingvoj..."

Zsuzsa Barcsay, estrino de la lerneja sekcio de la Instrua Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio, ĉiujare, ĝis sia frua forpaso en 2000, kolektis informojn pri la lerneja Esperanto-instruado en Hungario kaj preparis superrigardan tabelon laŭ la nombro da partoprenantoj, kiu variis inter ĉ. 300 kaj 2050 laŭ la statistikoj inter 1987 kaj 2000. Tie granda ŝanĝiĝo, malpliiĝo de la nombro de lernantoj videblas ekde la 1990-aj jaroj. La reĝimŝanĝo tutklare havis grandan efikon al la Esperanto-instruado kaj ankaŭ al la enlanda Esperanto-movado.

La ĉefa 'rimedo' de lingvoinstruado estas kompreneble la lingvoinstruisto. Kun estimo ni memoru ĉiujn, kiuj en lernejoj, kursoj ktp. instruis kaj disvastigis Esperanton kaj ni danku ilin pro la regula, ofte malfacila, sindonema laboro. Bedaŭrinde multaj el ili ne plu estas inter ni. Same ni danku ankaŭ al tiuj gekolegoj, geamikoj, kiuj aktive laboris kiel respondeculoj pri Esperanto-instruado en sia distrikto, regiono, departemento. Multaj el ili estis kompreneble studentoj de István Szerdahelyi kaj fariĝis fakuloj pri Esperanto-instruado en baza, meza kaj supera niveloj.

Fine, ni rigardu, kiom da aliaj agadoj, taskoj, organizaj laboroj apartenas al la lerneja edukado de Esperanto, kiom da diversaj agadkampoj devus esti menciataj kaj memorataj. Mi nur listigas ilin, ja pli detala prezentado povus esti temo por pluaj aliaj prelegoj, artikoloj. Jen la listo de aldonaj instruagadoj, kiuj okazis en la tempo de Szerdahelyi kaj poste: fakaj konkursoj por lernejanoj, kunlaboro kun la Landa Pionira Asocio, tendumado por la venkintoj en la fama pionira tendaro en Csillebérc,

korespondado inter lernantoj, enlandaj kaj internaciaj lernejaj projektoj, lingvoekzercaj aktivaĵoj, partopreno en Esperanto-eventoj, renkontiĝoj (ILEI-gimnazio dum la ILEI-konferencoj, Comenius-projektoj, Euroscola – vizito al la Eŭropa Parlamento).

Kompreneble ni devas mencii ankaŭ la pluklerigeblojn por instruistoj: spertinterŝanĝojn, dissendadon de fakaj informoj, ekz. per Pedagoga cirkulero, Pedagogiaj Tagoj, trejn-proponoj de Budapeŝta Pedagogia Instituto, organizado de IMS (Internacia Metodika Seminario), membriĝo, kunlaboro en la hungara landa sekcio de ILEI, partpreno en ILEI-konferencoj ktp.

Kun bedaŭro ni povas konstati, ke la instruado de Esperanto en la lernejoj paŝo post paŝo maloftiĝis, malaperadis en la lastaj kelkaj jardekoj. Malgraŭ la ankoraŭ ekzistantaj ŝtataj permesoj, la elekteblo de Esperanto kiel abiturienta fako, nur malmultaj lernantoj elektis Esperanton. La prezentita statistiko jam prognozis tiun malkreskon kaj kompreneble la fino de la studeblo de Esperanto en la budapeŝta universitato signifis, ke ne plu okazis kvalifikado de instrukapablaj diplomitoj, la generacio de Szerdahelyi-disĉiploj maljuniĝis, emeritiĝis. Eĉ la iam alta nombro de studentoj, kiuj lernis Esperanton por trapaŝi KER-ekzamenojn subite draste falis, ja laŭ novaj leĝoj ili ne plu devis prezenti lingvoekzamenan atestilon por ricevi sian diplomon post la fino de siaj altlernejaj aŭ universitataj studoj. La iamaj klopodoj kaj bonaj rezultoj de profesoro Szerdahelyi restas nur belaj ĉapitroj en la historio de lerneja Esperanto-instruado kaj restas nur la espero, ke iam venos pli bonaj tempoj kaj aktivaj fakuloj por sukcesa novstarto.

Malfruan dankon al majstro SZERDAHELYI István

de Blazio VAHA (n.s. WACHA Balázs, Hungario)

La 18-an de oktobro 2024, dum la konferenco memore al nia majstro SZERDAHELYI István [SERdahe-ji IŜTva:n][7], 1924-1987, **fakestro pri Esperantologio kaj interlingvistiko** en la Budapeŝta Universitato ELTE, mi parolis pri liaj esplor-atingoj.

[7] Mi indikadas kiel prononci liajn familian kaj personan nomojn, ĉar mi ofte aŭdas ilin misprononcataj.

Mi atentigis pri liaj malkovroj pri **etimologio de Esperantaj vortoj kaj vortradikoj** kaj pri lia klarigo de la **Esperanta vorto-strukturo**. Mi parolis pri lia manuskripto de lia **kandidatiga disertaĵo,** ne finita pro lia tro frua morto, pri lia kandidatiga disertaĵo tre valora kaj tre detalriĉa.

La disertaĵo temas pri interhomaj artefaritaj lingvosistemoj: SZERDAHELYI ekzamenas, **kiel diversaj, konscie kreataj, kreitaj sistemoj modeligas la realon. Li prezentas piktografiojn, ideografiojn, li klarigas aplikojn de ideo-mimografismo, fono-mimografismo ks., do** li prezentas, kiajn rimedojn **aprioraj** planlingvoj (lingvoprojektoj) uzas, uzis, tra la historio: ĉefe **inter la 14-a jarcento (Rajmondo Lullus) kaj la mezo de la 19-a jarcento (Volapuko)**, do en la periodoj antaŭ Esperanto.

Li priparolas ankaŭ priskribojn de fantaziaj lingvosistemoj en literaturo: utopiojn kaj malutopiojn. – Eksterteme, sen-emfaze, li esprimas sin tamen grave ankaŭ pri la sistemoj de Esperanto, Ido kaj pri la sistemo *Latino sine flexione*, ĉe la fino de sia disertaĵo.

Tre gravaj komponantoj de la agado de István SZERDAHELYI estis unuparte **esplorado** de la m e t o d o j instrui lingvon, aliparte liaj propraj efektivaj **instruado,** l**ekciado** en mezlernejaj klasoj, kursoj, universitato, inkluzive lian lekciadon pri diversaj branĉoj de esperantologio kaj interlingvistiko.

Du gravaj principoj ĉe instruado de fremdaj lingvoj estas, evidente 1) uzado, ĉefe **parola** uzado, de la instruata lingvo mem (kaj do evitado de la uzado de la media lingvo) 2) **prezentado kaj demonstrado** de la ĉiama (aktuala) „nova lingva materialo". Nian majstron SZERDAHELYI karakterizis, ke li **tiujn principojn** (diference de multaj aliaj pedagogoj, lekciistoj, profesoroj) ne nur „konfesadis", sed ja **aplikadis rigore**. Li uzadis Esperanton ne nur instruante al ni la lingvon dum instruhoroj de „parol-ekzercoj", sed …. sed li lekciadis pri movadhistorio, literaturo, metodiko kaj metodologio same en Esperanto, kaj ni priparolis ankaŭ aktualajn personajn temojn Esperante.

Li diris kaj rediradis, emfazis, ke la akcento en Esperanto tute regule aperas ĉe la antaŭlastaj silaboj de la vortoj, kaj li fakte akcentadis – diference de multaj nuntempaj hungaraj esperantistoj – la silabojn antaŭlastajn. La pleje emfazatan elementon (fokuson) de frazo kontrastiga, li „super-akcentadis", same ĉe la antaŭlasta silabo de la koncerna vorto – denove diference de multaj hungaroj, kiuj „almenaŭ ĉe grava emfazo emas kvazaŭ modifi la Esperantan akcentad-regulojn."

Instruante, sinjoro Szerdahelyi majstre enkondukadis vortojn novajn por la gelernantoj. Fakte li ĉion, ĉiun lingvan elementon speciale demonstris. Ekzemple, en kurso en la bulgaria urbo *Burgas,* li distrancis bele grandan akvomelonon por klare komprenigi, kion signifas *duono, kvarono, okono*, krome *unu kvarono, tri okonoj…* ks. Li ne forgesadis prezenti novajn vortojn ankaŭ en ĉiuj eblaj sintaksaj funkcioj: *Jen estas tablo. Mi vidas la tablon. Sur la tablo estas glaso, du libroj kaj cindrujo.* Se okazis io neatendita, li reagis en Esperanto. Ekzemple, se ni ekaŭdis bruon el najbara ĉambro, li diris. *Kio okazis? – Iu venis. – Kiu venis?* Li sciis, ke ni, gekursanoj, atentas tion, kio, neatendite, okazas, kaj li estis preta ŝanĝi la temon por momento.

Estas por mi interese, kiel li konceptis la studobjekton *metodologio.* Mi pensas, ke tio estis tute sentradicia kaj tio verŝajne restas ne imitata. Li prezentis en unu (sama) universitata lernolibro ĉion, kio koncernas iajn teoriajn aŭ praktikajn aferojn pri perceptado, lernado, alproprigado, konceptado de lingvo. Do lia *Metodologio* prezentas historie kaj **lingvo-sciencon** (kiel oni lernas la esencon de homa lingvo) kaj **principojn kaj detalojn pri metodoj de lingvoinstruado** (kiel oni instruas kaj lernas lingvojn). La titolo de la lernilo, aperinta en la jaro 1975, estas temofidele vasta: *Metodologio de lingvostudado kaj parolalproprigo*. (Ĝi ampleksas 376 paĝojn kaj ĝi enhavas ankaŭ gravajn partojn dokumentecajn.)

Publikon li timis neniam, li prelegadis kun plezuro al lingvistaj, instruistaj komunumoj, al kolegoj, al gestudentoj, al pli vasta publiko same volonte.

Ni ne forgesu liajn instruojn, ni havu liajn verkojn ĉemane kaj ni konservu lian optimismon.

Eldoniĝis la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23*

de Alessandra MADELLA (Italio)

Ĉi-decembron oni festos la 75-jariĝon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La estraro de ILEI decidis celebri tiun gravan mejloŝtonon en la vivo de nia asocio per pluraj agadoj, inter kiuj ĵus realiĝis la papera eldono de la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23*. La preskaŭ 300-paĝa volumo kolektas ese-forme preskaŭ ĉiujn simpoziajn prelegojn de VEKI-3 kaj de Linjano Orsabla, plus kelkajn similtemajn kaj samnivelajn okazintajn alitempe kaj aliloke. Ĝi mendeblas ĉe la eldonejo Edistudio de Pisa, Italio (https://edistudio.it/articolo.php?id=175) same kiel, kun samaj

kondiĉoj, ĉe la libroservo de UEA. Sed, por danki niajn sekciestrojn kaj komitatanojn pro ilia daŭra grava laboro por la Ligo, la estraro de ILEI decidis ankaŭ disponebligi senpagan ekzempleron al tiuj, kiuj deziras ĝin. Eblos mem preni/prenigi ĝin venontan someron dum la UK de Brno, Slovakio, aŭ dum la ILEI-Kongreso de Beogrado, Serbio, en kiu espereble vi partoprenos multnombraj. Sekciestroj, kiuj servas ankaŭ kiel komitatanoj, rajtos ricevi du ekzemplerojn. Pro la neceso porti tiom grandan kvanton da libroj, antaŭanonco de la deziro ricevi tie la libron multe faciligus la organizadon. Por sekciestroj kaj komitatanoj, kiuj pro iu ajn kialo ne povos akiri sian ekzempleron en la menciitaj kongresoj, sed ŝatus ricevi ĝin alimaniere, estos la kroma eblo mem pagi la sendokostojn.

Certe ni ne bezonas paroli al niaj membroj pri la graveco de la Simpozioj de ILEI, pri kiuj ili jam bone konscias. Sufiĉas substreki, ke ili ideale reprezentas la momenton, en kiu esperantistaj universitatanoj aŭ universitat-nivelaj fakuloj povas pli facile diskuti inter si kaj kun siaj ne-esperantistaj kolegoj. Danke al la ĝenerala alta nivelo de samideana esplorado, ne estis malfacile por nia estrarano Fernando Pita trovi sufiĉe da valoraj prelegoj ene de Esperantujo pri la du elektitaj temoj: „Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado" (2022) kaj „Instrui – ne nur Esperanton! – ekster lernejaj medioj". Sed bonŝance ni kapablis altiri ankaŭ tre interesajn prelegojn el ekster ĝi. Ekzemple, Du Xin de la Universitato Keio, Japanio, analizis la interkulturan komunikadon de ĉina subkulturo de fervoruloj de japana animacio kaj Olta Totoni de la Universitato Lancaster, Britio, parolis pri la hispanaj tradukoj de lingvo kreita de la verkisto Anthony Burgess. Por montri tiun dezirindan vastigon de niaj temoj kaj aliroj, kiel redaktoro mi lasis en la kolekto la eseojn en ilia originala lingvo (respektive la japana kaj angla), aldonante Esperantan tradukon, same kiel okazis dum la simpoziaj prezentoj mem, spekteblaj en la jutuba kanalo UEAviva.

Plia grava redakta elekto mia estis lasi la kopirajton por ilia eseo al la aŭtoroj, kiuj preferis gardi ĝin. Baze, Edistudio havas la kopirajton por la tuta volumo, sed la listo de la aŭtoroj gardantaj la kopirajtojn por siaj kontribuaĵoj aperas en la unua paĝo post la kovrilo. Kvankam tio ankoraŭ ne estas normala praktiko en Esperantujo, estis tri fundamentaj kialoj por tiu ĉi decido. La unuaj du estas tio, ke la peto venis de la aŭtoroj mem kaj tio povas seriozigi la tuton, se ni volas prezenti la kolekton ekster Esperantujo, ĉar tio konformiĝas al la nuntempaj normoj por scienca publikigado. Simile mi lasis la aŭtorojn uzi sian preferatan formaton por bibliografioj kaj citaĵoj. La tria kialo estas tamen la plej grava. Kiel estraro de ILEI ni esperas, ke la eseoj

kreitaj por ni povos ankaŭ havi duan aŭ trian vivon en aliaj volumoj, kunmetitaj de aliaj instancoj por aliaj celoj, publikoj kaj kuntekstoj, eĉ en aliaj lingvoj. Tiel la frukto de nia laboro povos servi por disvastigi eĉ pli multe nian mesaĝon, kiu en tiuj ĉi Aktoj centriĝas pri triamonda kaj virincentra aliro al justa edukado pere de Esperanto. Ekzemple, la verkaĵo de Sara Spanò pri la instruado de literaturo laŭ la usona verkistino Flannery O' Connor povus facile trovi sian lokon en antologio pri literaturaj studoj, ne laste ĉar baldaŭ lanĉiĝos holivuda filmo pri la aŭtorino, kiu certe kreskigos ŝian famon. Tiel verko originale kreita en Esperanto povus akiri pli da videbleco, samtempe ĵetante lumon sur la laboron de ILEI cele al la disvastigo de Esperanto-edukado kaj espereble kreante novajn pontojn por ĝi. Danke al la elektita kopirajta sistemo, sufiĉos por la interesiĝantoj kontakti la individuajn aŭtorojn por peti la eblon reuzi iliajn verkojn aliloke, citante kompreneble la originalan lokon de apero. La tuta procezo estos, do, multe simpligita por ĉies avantaĝo.

Por ke eseoj povu havi duan, trian aŭ plian vivon, la unua kondiĉo estas kompreneble, ke ili estu bone verkitaj kaj prezentu la plej ĝisdatigitan staton de la esplorado pri sia temo. Ni devos kompreneble atendi la juĝon de sendependa recenzisto pri tiu punkto. Sed kiel redaktoro mi povas atesti pri la fakto, ke la plejmulto de la aŭtoroj plene reverkis sian eseon post la Simpozia prelego, respondante al demandoj de la publiko, konsultante novajn materialojn kaj profundigante sian penson por krei kompletajn, aŭtoritatajn kontribuojn, kies influo espereble daŭros en la tempo. Pro tio mi invitas niajn membrojn legi tiun kolekton, celebri kun ni la 75-jariĝon de ILEI kaj pensi pri tio, kiel mem kontribui al la venonta Simpozio kun ĉiam novaj kaj riĉigaj esploroj pri la multaj flankoj de nia tutmonda agado.

Aktoj por la 75-jariĝo de ILEI

artikolo de Alessandra MADELLA por Ĉina Radio Internacia (Publikigita: 2024-09-26)

Ĉi-jare oni festas la tre gratulindan 75-jariĝon de la Ĉina Popola Respubliko. Kaj decembre oni festos ankaŭ la 75-jariĝon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Pro tio la estraro de ILEI estas organizanta plurajn agadojn, kiuj iras de celebrado por la kvara eldono de la Premio Maŭro La Torre ĝis premio por „La Instruisto de la Jaro" kaj ĝis tre intensa eldona agado. Parto de tiu lasta estos antologio de la plej bonaj artikoloj de la unua periodo de *Internacia Pedagogia Revuo*, kiu estas nun la organo de

ILEI, sed kiu fakte datiĝas de antaŭ ĝia fondiĝo. Zorgos pri tiu historia projekto la estrarano Fernando Pita, dum mia tasko estis redakti por eldonado la libron *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23*, kiu ĵus aperis paperforme ĉe la itala esperantista eldonejo Edistudio[8].

ILEI organizas ĉiun jaron buntan internacian Kongreson kun ĉeftemo aparte grava por edukado. Ene de ĝi okazas ankaŭ Simpozio, kiu ideale estas ŝanco de diskutado inter esperantistaj kaj ne-esperantistaj universitatanoj aŭ universitat-nivelaj fakuloj pri temoj de komuna intereso. Ekzemple, en somero 2025 la 58-a Kongreso de ILEI okazos en Beogrado, Serbio, kaj la jam decidita temo por kaj la Kongreso kaj la Simpozio estos „AI kaj lingvolernado". Lokaj universitatanoj jam montris sian fortan deziron kunlabori kun la LKK cele al starigo de sukcesa internacia evento.

Sed la tradicio de ILEI-Simpozioj estas longa kaj ĝi ofte fariĝis motoro de eldona agado. Antaŭa ekzemplo pri Serbio estas la resumaro de la rezultoj de la Simpozio pri lernado en virtualaj komunumoj okazinta en Čačak en 2019[9]. Kaj certe indas senpage elŝuti la kolekton *Simpoziaj Aktoj: ILEI 2020-2021*, aparte riĉan je kontribuoj pri interlingvistiko[10]. Kompilis ĝin Fernando Pita kaj bite publikigis ĝin la brazila eldonejo *Tématica* en somero 2023.

Ĉi-jare mi prenis lian torĉon kaj simile redaktis la libron *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23*. La 284-paĝa volumo en Esperanto, kun partoj en la angla kaj en la japana, kolektas eseojn, kiuj kreskis el prelegoj prezentitaj dum la Simpozioj de la Tria Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI-3) en 2022 kaj de la hibrida ILEI-Kongreso de Linjano Orsabla en Italio en 2023. En tiu ĉi lasta okazo temis pri mojosa kunkongreso kun la junuloj de TEJO. La temoj estis respektive „Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado" kaj „Instrui – ne nur Esperanton! – ekster lernejaj medioj". La ĉefprelegantoj estis Fabrizio Angelo Pennacchietti, emerita profesoro pri Esperantologio kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Torino en Italio, kaj Gong Xiaofeng (Arko), emerita profesorino ĉe la Universitato de Nanchang kaj nuna estraranino de UEA. Iliaj kleraj kontribuoj vigligis plurmonatajn internaciajn diskutojn pri la signifo de „lingva higieno" rilate al Esperanto kaj konsciigis la publikon pri la graveco eksperimenti novajn vojojn instrui pere de la reto, kreante viglajn virtualajn komunumojn, ekzemple, de amantoj de Esperanta literaturo.

[8] https://edistudio.it/articolo.php?id=175
[9] http://ftn.kg.ac.rs/konferencije/lvc2019/BookofAbstractsLVC_final.pdf
[10] https://www.ilei.info/agado/Simpoziaj_Aktoj_ILEI_2020-2022_e-libro.pdf

La kolekto riĉas je kleraj kontribuoj, kiuj reliefigas triamondan kaj virincentran perspektivojn en Esperanto-edukado. Sed la temoj estas pli larĝe pritraktitaj por plene kapti la nuntempajn evoluojn eĉ ekster Esperantujo. Ĉirilate, alia interesa kontribuo pri Ĉinio estas sociologia esplorado de Du Xin, ĵurnalistino kaj lekciistino ĉe la prestiĝa privata Universitato Keio en Tokio, Japanio, kiu montras kiel intereso pri japanaj animacioj fare de ĉinaj fervoruloj povas porti al la deziro lerni la lingvon kaj eĉ viziti la landon por turismo aŭ laboro. Sed Ĉinio jam aperas sur la kovrilpaĝo mem de la kolekto. Tie staras, fakte, la studentoj de la magistra programo pri Esperantologio ĉe la Universitato de Poznano en Pollando, fotitaj dum la Germana Kongreso kun sia profesorino Ilona Koutny kaj la prezidanto de UEA Duncan Charters. Interese, la du homoj, kiuj plej intense fiksas la fotilon, la junulino Long Yunxia (Nuba) kaj la junulo Li Bochuan (Briko) nun ambaŭ laboras ĉe la Esperanto-Muzeo de la Universitato de Zaozhuang, pluvivigante tiun sperton kaj donante al ĝi novajn radikojn kaj espereble novan estontecon.

Sur blanka tabulo malantaŭ la studenta grupo estas skribite „*Der Krieg ist aus!*” (germane, „La milito finiĝis!”). Tiuj signifoplenaj vortoj kvazaŭ enkondukas la antaŭparolon de la prezidanto de ILEI, Ahmad Reza Mamduhi, pri tio, kiel justa edukado pere de Esperanto povus porti nin al pli egalrajtaj internaciaj rilatoj kaj tiel al monda paco. Ni esperas, do, ke la 75-jariĝo de ILEI estos signifoplena paŝo, kiu portos nin al pliaj atingoj en tiu ĉi direkto.

La Interlingvistikaj Studoj en AMU finis sian agadon per la lastaj ekzamenoj

Ilona KOUTNY, prof. UAM
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj de AMU

La Interlingvistikaj Studoj en la Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU) estis fonditaj en 1997 per rektora dekreto kaj la unua grupo startis en 1998. Inter 9. kaj 11.09.2024, post 26 jaroj da funkciado, la oka grupo trapasis sian lastan ekzamenon kun defendo de faklaboraĵoj. Tiu ĉi grupo estis la plej granda komence en 2021 kaj ankaŭ fine. 11 gestudentoj prezentis siajn temojn rilatajn al 3 specialiĝoj (krome 3 sekvos baldaŭ):

El **tradukado** (gvidanto de la unuaj 3 laboraĵoj: Chris Gledhill):

GONG Xiaofeng (CN): Apliko de universalaj trajtoj de tradukado en la tradukoj de la ĉina klasika romano *Ruĝdoma Sonĝo* (recenzanto: Nicolau Dols)
O Gisook (KR): Korea-Esperanta traduko de korea moderna poezio (recenzanto: Klaus Schubert)
Vitor Tagor de Magalhaes Monteiro (BR): Aŭtomataj Tradukiloj (recenzanto: Klaus Schubert)
YU Jianchao (CN): El la ĉina al Esperanto: diferencaj esprimoj en realaĵo, strukturoj kaj kulturaĵoj (+ etvortara ĉapitro pri lernado, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto: Alessandra Madella).

El **interlingvistiko** (gvidanto Vera Barandovská-Frank):

Ana Alebić-Juretić (HR): La fonto(j) de la Fiuma idiomo. Ĉu la Fiuma idiomo estis la unua internacia lingvo en Rijeka (eksa Fiume)? (recenzanto: Ida Stria)
Renato Guedes Filho (BR): Ikoneco por artefaritaj lingvoj (recenzanto: Ida Stria).

El la **Esperanto-movado** (gvidanto Mark Fettes):

Fabio Fortes (BR): Kiom lingvo efikas sur la mondo? La utopioj kaj la politika programo de Esperanto laŭ brazilaj esperantistoj (recenzanto: KIMURA Goro Christoph)
Tim Owen (GB): Esperanto en Britujo: de la Unua Libro ĝis gastigado de la Universala Kongreso en 1907 (recenzanto: Ziko van Dijk).

El **metodiko** (gvidanto Katalin Kováts de la unuaj 2 laboraĵoj):

Maurizio Giacometto (IT/GB): Dedistanca edukado en Esperanto: la programo *Ekparolu!* kiel ilo por efika dua-lingva akirado (recenzanto: Peter Weide)
Rafał Darasz (PL): Andrzej Pettyn – la pedagogia penso kaj aliro al instruado spegulita en liaj elektitaj lernolibroj de Esperanto (recenzanto: Barbara Pietrzak)
Milan Kolka (CN): Pretigo de elektronika versio por plurlingva temvortaro (+ programado, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto Markos Kramer).
Ankaŭ la unujaran **instruistan trejnadon** finis 5 partoprenantoj (gvidanto Katalin Kováts):

Aranka László (RS): Reta instruado de Esperanto en miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj
Nedeljka Nedeljka Ložajić (RS): Reta instruado de Esperanto por nevidantoj
Yentl-Rose Hemelrijk (NL): Pedadogia analizo de verkigaj taskoj
Lidka Komar (PL): Halina Komar kaj ŝia socia agado per Esperanto
ZHANG Changsheng (CN): Kultura konverĝo, tradukado kaj elpensoj por ĝia instruado (+ etvortara ĉapitro pri laboro, gvidanto Ilona Koutny)

Ili havis kompleksan ekzamenon pri Esperantaj lingvo, kulturo kaj movado, krome provinstruadon. Ni havis la bonŝancon gastigi ankaŭ la prezidanton de UEA, Duncan Charters, kiu partoprenis en ilia prijuĝo kaj transdonis la instruistajn diplomojn.



La interlingvistika grupo kun Katalin Kováts kaj Ilona Koutny

Post la ekzamenoj okazis la **Interlingvistika laborsekcio de la fama Internacia Lingvista Kongreso** en Poznano kun 12 anglalingvaj prelegoj kaj diskutoj, en kiu ankaŭ la studentoj povis partopreni. Ĵaŭde la studentoj kaj instruistoj de la Interlingvistika fako de AMU festis kune kun la

prelegantoj de la Kongreso dum agrabla bankedo. Dankon al ESF por la subteno de la studentoj kaj festado.

La kultura festivalo **Arkones** (same la lasta) fermis la semajnon per riĉa programo. Pluraj kontribuoj de finstudintoj kaj instruistoj kolorigis la programon: Arko (Gong Xiaofeng) pri tradukado, virina agado; Longarko (ZHANG Changsheng) pri la Granda Ĉina Kanalo; Milan Kolka pri la estonta UK en Brno; kontribuo al la temvortara projekto; Hoan Thi Tran pri vjetnamaj manĝkutimoj. Vitor Monteiro gitarludis dum la miela vespero kaj Nicolau Dols deklamis katalunan poemon en la originala kaj Esperanta versioj. Michael Farris prezentis kreolajn lingvojn; Katalin Kováts per tabua kaj intima temo altiris la publikon: en la ombro de kancero. Ŝi ankaŭ RISKO-ludigis la partoprenantojn. Duncan Charters prelegis pri literaturo kaj pri UEA; François Lo Jacomo pri la ebla Unesko-rezolucio pri Esperanto; Ilona Koutny pri la temvortara projekto kun siaj kunlaborantoj (ili prezentis la du novajn temvortaretojn kun ĉina versio); raportis pri la Lingvista Kongreso kaj rememoris pri sia instruisto kaj antaŭulo, István Szerdahelyi (fondinto de la Esperanto-fako en Budapeŝto) okaze de lia 100-jara jubileo. Ŝi prezentis ankaŭ la libron, kiun ŝi kompilis el liaj verkoj.

Interkulture kaj inkluzive en Beogrado

de Radojica PETROVIĈ (Serbio)

La 88-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) kaj trejnseminario por Esperantaj instruistoj kaj aktivuloj, kiun Serbia Esperanto-Ligo (SEL) subvenciigis el la EU-programo Erasmus+, estis la akso, ĉirkaŭ kiu kreiĝis la programo de la kombinita evento „Interkulture kaj inkluzive", kiu okazis en Zemuno (parto de Beogrado), inter la 17-a kaj 24-a de aŭgusto 2024, kun financa subteno de UEA kaj ILEI aldone al tiu de Erasmus+. „Interkulture" ĉar ĝi estis ero de la UEA-agado celita al kreskigo de interkultura komunikkompetento. „Inkluzive" ĉar ĝi kunvenigis kaj kunloĝigis blindajn kaj vidantajn esperantistojn el diversaj landoj, entute 56 el 14 landoj, ebligante konatiĝon kun diversaj vivperspektivoj kaj diversaj kulturaj fonoj.

En sia salutmesaĝo al la organizantoj kaj partoprenantoj de la evento, la Prezidanto de ILEI Ahmad Mamduhi emfazis:

„La temo ’Interkulture kaj inkluzive’ estas ne nur taŭga, sed ankaŭ esenca en nia nuna mondo. Ĝi resonas profunde kun la fundamentaj principoj de Esperanto kaj ILEI. Ni vivas en epoko, kiam interkultura dialogo kaj inkluziveco estas pli gravaj ol iam ajn, kaj via evento montras kiel Esperanto povas ludi gravan rolon en tiu procezo.”

Ĉar la evento okazis en la mezo de balkana regiono, kun multaj ILEI-anoj inter la organizantoj kaj partoprenantoj, gravaj fadenoj en ĝi estis „Balkanaj tagoj” (tiuregionaj kunlaborigaj interkonsiliĝoj) kaj „Tagoj de ILEI” (kiel ILEI plifortigu sian ĉeeston kaj agadon en la regiono). El tiuj diskutoj, precipe enkadre de la seminario, naskiĝis nova edukprojekto, ĉi-poste klarigita per kelkaj pliaj vortoj.

La programo ampleksis abundon da edukaj, kultur-artaj kaj turismaj eroj kontribuantaj al la persona kaj profesia kresko de la partoprenantoj. En la seminario ĉefprelegis la prezidanto de UEA, Duncan Charters, pri interkulturaj sentemo kaj kompetento, kaj Francesco Maurelli kun Sara Spanò, pri projektmastrumado kaj EU-programoj. Kelkaj aliaj partoprenantoj kontribuis per siaj spertoj ligitaj al la ĉeftemo. En la praktika ateliera parto de la seminario estis diskutataj kelkaj projektideoj, el kiuj naskiĝis nova partnera edukprojekto proponata al Erasmus+ laŭ la alvoko kun oktobra limdato, kies rezulto estos konata post kelkaj monatoj.

Kelkaj eksterseminariaj prelegoj traktis temojn de ĝenerala kulturo kaj kleriĝo, ekzemple pri rusa klasika literaturo, egiptaj hieroglifoj kun palpeblaj reliefaj modeloj por blinduloj, Esperanto kaj tradukarto, informteknologiaj faciligoj por nevidantoj k.a. La Konversacia rondo de Natalia Kasymova celis progresigon de Esperantaj komuniklertoj.

La kulturartan kaj distran programon riĉigis Blanka Laslo, Danijela Petroviĉ, Saŝa Pilipoviĉ, Karsten Schnathorst – Kaŝi, Nedeljka Loĵajiĉ, Uroŝ Martinoviĉ, kantgrupoj surloke kreitaj kaj ekzercintaj, pluraj deklamantoj de Esperanta poezio. Du duontagaj ekskursoj en Beogrado kaj unu tuttaga iom suden, ĝis Kragujevac – la unua ĉefurbo de moderna Serbio, ebligis al la partoprenantoj enrigardon en la lokajn kulturon kaj historion. Komuna tagmanĝo en nacistila restoracio en Kragujevac kaj vespermanĝo sur barĝo aranĝita restoracie, ankrita sur Danubo proksime de la kongresejo, aldonis al la tuta travivaĵo iom da balkanaj gustoj kun odoro de lokaj manĝkutimoj.

Kaj, grave en la perspektivo direktita futuren, la evento signifis novan plispertiĝon de la organiza teamo de SEL por novaj internaciaj renkontiĝoj en Serbio. La kontento de la partoprenintoj signifas gravan kuraĝigon. Post

internaciaj eventoj de REF en Rudnik (2017), SAT en Kragujevac (2018), ILEI en Ĉaĉak (2019), „Interkulture kaj inkluzive” en Zemuno (2024), la serio daŭriĝos per ILEI-kongreso en Beogrado (2025), IFEF-kongreso en Mokra Gora (2026) kaj poste ni vidos kio ankoraŭ.

Tra brajlo kaj muziko al la mondo

de Danijela PETROVIĆ (Serbio)

Lui Braj (Louis Braille) naskiĝis en Francio en la jaro 1809. Ludante per aleno de sia patro, li pikis sian okulon. Pro tio li blindiĝis.

Kiam Lui estis knabo, li kreis perfektan sespunktan sistemon (brajlan alfabeton). Tiel ekestis ankaŭ matematikaj, muzikaj kaj aliaj signoj en la brajla sistemo. La brajla alfabeto multe plifaciligis la vivon kaj edukadon de la blinduloj.

La brajla alfabeto kaj muziko havas precipan rolon en la vivo de nevidantaj homoj. Kun ambaŭ ili renkontiĝas en sia infanaĝo. La tuŝkapablo kaj la aŭdkapablo estas gravaj kiam oni parolas pri perceptado. Infanoj, kiuj volas komenci pritrakti muzikon, unue renkontiĝas en lernejo kun la brajla alfabeto ĉar ili devas ellerni ĝin. Tial, unue ili lernas la literojn, ciferojn kaj aliajn simbolojn, kaj nur poste ili eklernas muziknotojn. Pli malofte la procezo estas inversa. Ĉi tio estas grava, ĉar ankaŭ la muziknotojn oni legas kaj skribas brajle. Tio, kio estas okuloj por vidantaj homoj, ĉe nevidantoj estas oreloj kaj tuŝoj.

Oni legas kaj skribas brajlan alfabeton per ambaŭ manoj. La bazo de la alfabeto estas ses punktoj (sespunkta sistemo), ordigitaj tri maldekstre kaj tri dekstre. La sama regulo estas por brajlaj muziknotaj tekstoj. Alie, dum ludado de muzikinstrumento, ne estas eble legi samtempe per ambaŭ manoj. La maldekstra mano legas skribitan tekston kaj la dekstra ludas ĝin, kaj inverse. Tiel estas ne eble legi kaj ludi ambaŭ sekciojn – de la dekstra mano kaj de la maldekstra. Pro tio, la tekston oni tuj devas lerni parkere, parton post parto aŭ frazon post frazo, takton post takto. Ambaŭ sekcioj sur la sama paĝo troviĝas unu post la alia alterne. Unue oni skribas la dekstran manon kaj sube la maldekstran. Aliajn simbolojn ligitajn al muziko, kiel fingroordo, dinamiko, oni skribas malantaŭ kaj antaŭ la notoj, ne sube aŭ supre kiel en notliniaro por vidantaj.

En la tuta mondo, la notojn oni skribas sammaniere, sed la skribordo ne estas la sama en ĉiuj landoj. Plejparte oni skribas laŭ temaj partoj, unue la dekstran, poste la maldekstran manojn, kaj tiel alterne, sed ie oni skribas la dekstran kun la maldekstra mano takton post takto. Ĉiu maniero de la skribo havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Iam estas pli bone skribi la sekciojn alterne, sed la alia maniero havas sian avantaĝon, ĉar se oni skribas la takton de la maldekstra kaj la saman takton de la maldekstra manoj, tiam ni povas scii tuj kion ludas la dekstra kaj kion la maldekstra manoj en la sama takto. Tio povas plifaciligi kunigon de ambaŭ manoj, sed same, tio povas malplifaciligi ĉar, se ni bezonas nur la dekstran manon, ni devas transsalti takton de la maldekstra.

Oni ne skribas muziknotojn sammaniere por ĉiu instrumento. Tial ekzistas simboloj, kiuj havas pluroblajn signifojn. Por iuj instrumentoj, la legado estas la precipa problemo. Kiu ludas gitaron, unue devas tralegi la frazon, tiam formeti la libron de sur la genuoj por preni la gitaron ludendan per ambaŭ manoj. Poste, por denove uzi la libron se necese, nepras formeti la gitaron aŭ meti la libron sur pupitron kaj tiel legi.

Absoluta aŭdkapablo, bona memoro kaj aliaj kapabloj estas tre gravaj, sed sen muzika brajla alfabetigo, la klerigado estas tre malfacila. La infanoj, kiuj ne ellernis la brajlan alfabeton aŭ legas ĝin malfacile, havas problemojn en legado kaj skribado de muziknotoj. Ne gravas nur la rapideco en legado kaj skribado. Ekzistas simboloj, kiuj estas malaj unu de la alia, sekve infanoj miksas ilin. Necesas reorientiĝi disde la literoj kaj ciferoj al la muziknotoj. Multaj signoj havas pluroblan signifon. Ekzemple, iu signo en muziko ofte kongruas kun iu litero aŭ cifero en matematiko. Tiuj, kiuj ne sufiĉe uzas la brajlon pro manko de literaturo, aŭ malbone legas ĝin, estas devigataj aŭskulte lerni parkere, helpate de instruisto aŭ alia persono. Tio povas esti malfacila kaj postulas multe da tempo.

Koncerne la muzikliteraturon, en nia lando ekzistas apartaj problemoj. Nia biblioteko, muziklernejo posedas librojn el la tempo de Veljko Ramadanoviĉ. Tiam iuj blindaj muzikistoj donacis sian literaturon al la lernejo, aŭ iuj instruistoj heridigis siajn aĉetitajn librojn. Inter la libroj ekzistas diversaj muziknotoj, kiuj estas nelegeblaj, multfoje ili estis uzataj kaj oni devas reskribi ilin. Ekzistas literaturo, kiu estas legebla. Estas problemo, kiam unu verko estas ununura ekzemplero kaj ĝuste tiu libro estas bezonata por kelkaj gelernantoj. Tiam la instruisto devas elspezi multe da tempo por reskribi la notojn, sed tio tute ne estas facila. Tio ne estas kutima litera teksto, kiun oni legas frazon post frazo, sed ni transskribas ĝin de noto

al noto, de signo al signo, kaj per unu mano ni legas, per la alia ni reskribas. Memstara transskribado estas same tiom malfacila kiom la skribado helpe de persono, kiu diktas al vi. Al homoj, kiuj vidas kaj kiuj antaŭ si havas reskribendajn komponaĵojn, oni devas klarigi kiel dikti. La diktado kaj skribado estas tre longaj kaj lacigaj. La persono, kiu diktas, elparolas ĉiun noton kaj aliajn simbolojn, por ke la verko estu bone reskribita. La reskribo devas ĝustamaniere prezenti kiel la komponisto imagis la verkon, dum li kreis la muzikon.

Ni estas ofte devigitaj aĉeti aŭ prunti literaturon el aliaj landoj. Tio hodiaŭ estas pli facila. La plejmulto da literaturo ekzistas por piano, dum por aliaj instrumentoj ekzistas iomete, aŭ por iuj neniom, kaj ni devas elturniĝi. Ĉar la komputila tekniko progresis, hodiaŭ ekzistas programoj, kiuj transformas la notojn el la notliniara en la brajlan sistemon. Tial oni bezonas komputilojn, skanilojn, programojn kaj brajlajn presilojn. Hodiaŭ multaj ŝtatoj en la mondo printas muziknotojn. Antaŭ 13 jaroj, nia lernejo ekhavis ekipaĵon por printado. La 24-an de decembro en la jaro 2010 okazis humanitara koncerto, en kiu ludis niaj famaj muzikartistoj. Tiuj estis ekslernantoj de nia muzik-lernejo: Stefan Milenković, Lidija kaj Sanja Bizjak, Jasmina Trumpetaš kaj aliaj. Ĉi tiu projekto estis gvidata de du koleginoj, Zlata Maleš kaj Mirjana Mihailović por ekhavi ekipaĵon. Hodiaŭ ni havas presitajn librojn por solfeĝo, piano, harmonio, akordo, teorio de muziko. Ni plu laboras pri tio, ĉar iujn verkojn ni devas renovigi aŭ krei tiujn, kiujn ni ne havas. Ni devos enskribi en komputilon, ordigi por printado kaj nur tiam printi, por ke la instruado povu esti ĝustamaniera.

Kion la Japana-Korea Kongreso alportis al instruistoj

de Alessandra MADELLA (Italio)

Komence de oktobro 2024 mi vizitis Sudan Koreion por partopreni en la 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en la plaĉe tradicia urbo Jeonju, kun grupo de 11 homoj de la Zaozhuang-Universitato. Survoje ni vizitis la prestiĝan Hankuk-Universitaton de Fremdlingvaj Studoj en Seulo, cele al fortigo de rilatoj kaj ebla kunlaboro por projekto de nova internacia fako pri Esperanto kaj la ĉina, baldaŭ lanĉota en Zaozhuang. Tre gastame akceptis nin en la Konfucea Instituto du esperantistaj profesoroj: ĝia estro Na Mingu kaj Lee Young-Koo, honora prezidanto de Korea Esperanto-Aocio kaj de la universitato mem. Krom bela rulaĵo pentrita pri la historio de

la Silka Vojo, pentrita de Zhu Lirong, la plej signifoplena donaco de la ĉina delegacio estis la nove eldonita libro *MENGZI* laŭ la Esperanta traduko de la bedaŭrinde forpasinta profesoro Sasaki Teruhiro el Japanio. La originala libro de la konfucea filozofo kaj la pensoplena traduko de profesoro Sasaki estis fakte verkitaj en Zaozhuang.

La Kongreso mem okazis ĉe Jeonju-Nacia Universitato de Pedagogio, paralele kun la 6-a Esperanto-Forumo inter Shanghai kaj Seulo. Estis aparta honoro kaj plezuro por mi povi porti al tiuj gravaj eventoj la saluton de ILEI, kiu havas en Koreio unu el siaj plej grandaj sekcioj, kies viglaj membroj ofte aktive partoprenas en niaj kongresoj. Pluraj partoj de la programo alportis valorajn sciojn speciale al instruistoj kaj oni devis ofte elekti inter du aŭ pli da same interesaj, sed samtempaj eroj. Do, en mia mallonga raporto mi koncentriĝos nur sur kelkaj memorindaj kontribuoj, kiujn mi mem povis spekti. En la komenca simpozio, kiu okazis eĉ antaŭ la oficiala malfermo, loka fakulo prezentis la situacion de lingvoinstruado en la korea eduka sistemo, kaj Giridhar Rao same prelegis pri la kazo de Barato. Bak Giwan interese diskutis la defion de artefarita intelekto por lingvolernado, kiu konsekvence orientiĝas pli kaj pli al la individua komunika ĝuado de la uzanto mem. Laŭ li, tiu evoluo donas novan ŝancon al Esperanto, kiel lingvo de la komenco bazita sur la ĝuado de homaj rilatoj, pli ol sur ekonomia utilo.

Siaflanke, So Jinsu, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, estrarano de UEA kaj universitata fakulo pri arta ekonomiko, malfermis la laborojn pri la kongresa temo „Novaj tendencoj de kulturaj mondoj en Japanio kaj Koreio". Li parolis pri la diversaj fazoj de la tutmondiĝo de la korea kulturo, de televidaj dramoj kaj filmoj ĝis la muzika ondo de la tiel dirita „K-pop", substrekante nuntempajn evoluojn kiel la rolo de artefarita intelekto kaj la kreskanta merkato de ciferecigitaj artaĵoj. Krom la kunlaboroj inter vidaj kaj muzikaj artistoj de Japanio kaj Koreio, interesa parto de lia kontribuo estis kiel plej bone uzi artajn enhavojn kaj kunligojn por videbligi Esperanton en sociaj retejoj. Interesaj prelegoj de la japana flanko inkluzivis promenadon de Kitagawa Ikuko, prezidantino de Japana Esperanto-Instituto, al la malkovro de koreaj historiaj spuroj en la kvartalo Ŝin-Okubo de Tokio. Al ĝi eĥis amuza kaj pensiga komparo pri popolaj dirmanieroj en Koreio kaj Japanio fare de Kitagawa Hisasi. Belmonto klere kontrastigis sian lastatempan tradukon de la japana klasikaĵo *Rakontaro de Genĝi* de Murasaki Ŝikibu kun antaŭaj esperantigoj. Fine kortuŝis la rakonto de Kitagawa Syozi pri okazintaĵo en la 19-a jarcento proksime de la urbo Obama en Japanio. Tie fakte la lokanoj helpis koreojn erare alvenintajn tien pro mara

tempesto, malgraŭ la ordono de la registaro tion ne fari kaj ĝia klopodo forviŝi tiun memoron de spontanea amikeco inter popoloj.

Inter la ĉinaj prelegoj aparte memorindas la du faritaj por la faka kunsido de la Zamenhofa Instituto, fondita per la mono kolektita per la retaj Esperantaj kursoj de Bak Giwan. Zhao Jianping, iama redaktoro de Ĉina Radio Internacia, rakontis pri sia lernado de Esperanto en Orient-Ĉina Normala Universitato, sub la gvido de Qian Minqi, kiu ludas Jolanda en la fama videokurso *Pasporto al la Tuta Mondo*. Post lia eniro en la radion, Xie Yuming, la tradukinto de *Ruĝdoma Songo*, helpis lin serioze profundigi sian studadon pere de speciale verkita lernolibro kun 365 lecionoj kaj listo de legindaj libroj. Sun Mingxiao (Semio) prezentis siaflanke la ĉefajn konservaĵojn ĉe la Esperanto-Muzeo de la Zaozhuang-Universitato, multaj el kiuj havas historian valoron rekonatan de la registaro.

Konklude, tiu ĉi kongreso kun partoprenantoj el 16 landoj, pruviĝis tre interesa ŝanco de komuna lernado kaj multon alportis al instruistoj rilate al interkultura komunikado kaj sugestoj por pli engaĝaj lecionaj enhavoj.



Belgio

Belga Esperanto-Studsemajnfino (B.E.S.T.)

KIU kunorganizas Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kaj Espéranto Wallonie (V.Esp-o)
KIAM? semajnfinon de 21-23 februaro 2025 (vendredvespero ĝis dimanĉtagmezo);
KIE? gastejo DE IEP, Poperingseweg 34, 8900 Ieper;
POR KIUJ? komencantoj; progresintoj (kiuj sekvis bazan kurson); plenlernintoj (intereso pri gramatikaj finornamaĵoj, vorttrezoro, beletro).
KOTIZO € 130 - por gemembroj de belgaj Esperanto-asocioj kaj ne-belgoj, € 140 - por aliaj.

La kotizo inkluzivas manĝojn, teo- kaj kafo-paŭzojn, tranokton, kursojn donitajn de konataj kaj spertaj esperantistoj, libroservon.
Aliĝo validas ekde ricevo de la kotizo sur la konto BE15 5230 8080 6230 de Esperantoklubo La Konko.
La gastejo troviĝas je promendistanco de la urbocentro de la gemuta urbeto Ieper en la belga provinco Okcidentflandrio, ne for de la belga-franca landlimo. La urbo kaj la ĉirkaŭaĵo estas vere plenaera muzeo pri la Unua Mondmilito.
Pliaj informoj ĉe Piet Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8/0201, BE-8310 Kortemark, Belgio, tel.: +32 472 257 918, rete: piet.glorieux@gmail.com.
Informoj kaj perreta aliĝo: eventaservo.org.

Burundo

Esperantistoj subtenis indiĝenajn komunumojn en Burundo

La 28-an de septembro 2024, la burunda esperantistaro disdonis instrumaterialojn (kajerojn) kaj vestaĵojn al indiĝenaj infanoj de la komunumo Nyabihanaga, Mwaro-Provinco. Kiam ni alvenis al lernejo, la infanoj bonvenigis nin per kantoj. Tiu ĉi donaco estis donita danke al monkolektaj kampanjoj inter burundaj kaj eksterlandaj esperantistoj, specife de Scio Sen Bariloj (SSB), kaj la Svisa Esperanto-Societo (SES). Oni respondis al invito de la Ministro pri solidareco kaj homaj rajtoj, kiu petis de Nacia Esperanto-Asocio de Burundo „ANEB" okazigi Esperanto-instruadon al indiĝenaj instruistoj de la lernejo nomata *„GIRIMBABAZI TUJANE"*. En Esperanto tiu nomo signifas: *„ESTU KOMPATEMA, NI IRU KUNE"*.

La lernejo estis konstruita dum pli-malpli tri jaroj kun la celo helpi al la indiĝena popolkomunumo. Ĝi havas 200 studantojn kaj 20 instruistojn. En la pasinteco, infanoj de la indiĝena popolo malamis lernejon pro la laboro de siaj gepatroj.
La respondeca ministro pri solidareco kaj homaj rajtoj estas parto de tiu ĉi komunumo. Ŝi faris ĉion, kion ŝi povis por ŝanĝi la bildon kaj vivmanieron de sia komunumo. Ŝia celo estis krei ĉi tiun lernejon. Esperanto bonŝance estas elektita kiel lingvo de lernado kaj komunuma unuiĝo. Por tio la ministro petis, ke ni organizu Esperanto-instruadon en tiu ĉi lernejo por instruistoj.



Aime Patrick MANIRAKIZA

Francio

Espéranto-France eldonis du legolibrojn, kiuj celas komencantojn kaj progresantojn: Stranga malapero *kaj* Inès en Okcitanio.

Stranga malapero, de Lions-Oliviéri Marie-Laure
facila rakonto por komencantoj

Stranga malapero estas mallonga, 48-paĝa novelo, kiu ebligas al komencantoj komenci siajn unuajn legadojn.

La rakonto okazas en Korsiko. Estas la fino de la lerneja jaro kaj la lernantoj preparas *L'Avare* (La Avarulo) de Molière, teatraĵon. Sed strangaj aferoj okazas: stranga karaktero aperas kaj la patro de Carla kaj Enzo malaperas...
Tiu rakonto estas verkita en facila lingvo, tial komencantoj (ekde la nivelo A1 de la KER-sistemo) povas ĝui la rakonton. Antaŭ ol eldoni ĉi tiun libron, Espéranto-France laboris kun grupo da lernantoj, kiuj ĵus finis la dek-lecionan kurson aŭ jam studis kelkajn lecionojn. Tio helpis nin adapti la tekston kaj aldoni difinojn aŭ bildetojn por klarigi malfacilajn vortojn.
Fine de la novelo, du paĝoj da demandoj kaj ekzercoj donas al la leganto la okazon kontroli sian komprenon de la rakonto. Kvar pliaj paĝoj proponas demandojn pri la libro kaj pri la loko, kie okazas la rakonto. Ĉiuj respondoj estas en la lasta paĝo de la libro.

Formato: 150 x 210 mm • 48 paĝoj • ISBN: 978-2-9507376-9-4 • Leĝa depono: januaro 2021
Publika prezo en Francio: 9 €
Por aĉeti la libron: https://butiko-esperanto-france.org/
Rabatoj ekde 5 ekzempleroj, pri aĉeto kaj rabatoj por asocioj, libroservoj: vidu niajn kondiĉojn en https://esperanto-france.org/katalogo-butiko.

Inès en Okcitanio, de Laure Patas d'Illiers, legolibro por progresantoj

Inès alvenas al Okcitanio, regiono en la sudo de Francio, por studi. La junulino ŝatas la tiean vivon, sed okazas misteraj eventoj.
Ĉu ŝi travivos tragedion? Ĉu ŝi estos elpelita el Francio? Ĉu morto minacos ŝin? Ĉu amo kapablos protekti ŝin kontraŭ ĉiuj danĝeroj? Ĉi romaneto malkaŝos la destinon de Inès kaj helpos vin plibonigi vian komprenon de Esperanto. Legu, ĝuu!
Tiu ĉi romaneto, ilustrita per desegnaĵoj de la aŭtoro, celas precipe progresantojn. Ĝi estas disponebla kiel presita libro kaj bitlibro (EPUB).

Formato: A5 (148 x 210 mm) • 74 paĝoj • ISBN: 978-2-494261-02-0
Publika prezo en Francio: 9 €. La libron vendas Espéranto-France en sia retbutiko: https://butiko-esperanto-france.org/ kaj ĉe: https://www.lulu.com/spotlight/esperanto-france/. La libro estas disponebla en EPUB-formato ĉe https://www.lulu.com/spotlight/esperanto-france/.
Rabatoj ekde 5 ekzempleroj, pri aĉeto kaj rabatoj por asocioj, libroservoj: vidu niajn kondiĉojn en https://esperanto-france.org/katalogo-butiko.

Prezento de la aŭtoro, Laure Patas d'Illiers
Laure Patas d'Illiers vivas en Parizo, Francio. Kiel komputada inĝeniero ŝi helpas disvastigi la uzon de liberaj programoj en la francaj publikaj administracioj. Ŝi devenas el malnova franca nobela familio. Ŝi estas konsiliano de la franca branĉo de Eŭropo Demokratio Esperanto. Ŝiaj tekstoj aperis en pluraj gazetoj. Ŝi plurfoje estis premiita de la Belartaj konkursoj de UEA.

Emmanuelle RICHARD (Francio)

Germanio

***Alta ŝtata distingo de Germanio:* Zsófia Kóródy ricevis la Federacian Meritkrucon sur Rubando**

La prezidantino de AGEI (germana landa sekcio de ILEI), ĉefkunlaborantino de la Esperanto-Centro Herzberg, Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo estis honorata pro la pli-ol-20-jara multkampa volontula laboro por la socio, pro la vasta agado por Esperanto kaj la antaŭenigo de interkompreniĝo inter homoj de malsamaj naciecoj kaj kulturoj. Al la rara meritpremio apartenas diplomo subskribita de Frank-Walter Steinmeier, la Federacia Prezidento de Germanio.

Festceremonio
La transdono de la Meritkruco sur Rubando de la Meritordeno de la Federacia Respubliko Germanio okazis en la urbodomo de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. En la festevento partoprenis la urbestro Christopher Wagner, Marcel Riethig, la estro de la distrikta administrado en Göttingen, la eksurbestroj Gerhard Walter kaj Lutz Peters, kelkaj aliaj lokaj politikistoj, Peter Zilvar, gvidanto de la Esperanto-Centro kaj prezidanto de Esperanto-Societo Sudharco, reprezentantoj de regionaj Esperanto-asocioj kaj geamikoj.

20 jaroj da laboro por kaj per la paclingvo Esperanto
En sia laŭda parolado Sinjoro Riethig klarigis, ke la premio estas unuavice por tiuj, kiuj faras elstarajn kontribuojn al la komunumo, kiuj prenas respondecon, kiuj zorgas kaj kiuj montras kuraĝon defendi demokratiajn valorojn. Li aldonis, ke la vivo kaj laboro de Zsófia Kóródy estas karakterizitaj per klopodoj faciligi reciprokan kompreniĝon inter homoj de malsamaj naciecoj kaj kulturoj. Ĉi tie li inkluzivigis Esperanton kiel ponton de komunikado. Li emfazis, ke la ĝusta persono ricevis ĉi tiun premion pro siaj meritoj kaj priskribis la aktivadon de Zsófia Kóródy dum la lastaj 20 jaroj, aldonante, ke ŝia engaĝiĝo multe kontribuis al la kreado de Herzberg

kiel Esperanto-urbo. Li elstarigis kelkajn laŭdindajn aktivaĵojn: la sindonan laboron dum 15 jaroj por la junulara interŝanĝprojekto kadre de la urba ĝemeliĝo inter Herzberg kaj Góra en Pollando, la daŭran produktadon de tradukoj, broŝuroj, tabuloj ktp. por Herzberg – la Esperanto-urbo, la prizorgadon de la Esperanto-fakbiblioteko kun unikaj arkivmaterialoj kaj la organizadon de regionaj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj kaj kongresoj en Herzberg. „La mondo bezonas pli da interkompreniĝo kaj ĝuste tio faras ŝian laboron tiel valora por nia komunumo” – li diris.



VERLEIHUNGSURKUNDE

IN ANERKENNUNG
DER UM DIE BUNDESREPUBLIK DEUTSCHLAND ERWORBENEN
BESONDEREN VERDIENSTE
VERLEIHE ICH

FRAU
ZÓFIA BAROSSNE KÓRÓDY
HERZBERG

DAS VERDIENSTKREUZ
AM BANDE
DES VERDIENSTORDENS DER BUNDESREPUBLIK DEUTSCHLAND

BERLIN, DEN 8. APRIL 2024

DER BUNDESPRÄSIDENT



Gratuloj, dankoj

Gerhard Walter, la iama urbestro de Herzberg, kaj lia posteulo, Lutz Peters estis inter la unuaj gratulantoj. Peter Zilvar, prezidanto de la Esperanto-Societo Sudharco (EGS) ekde 1976, gvidanto de la Esperanto-Centro dankis Zsófia Kóródy pro ŝia grava kunlaboro kaj senlaca engaĝiĝo, kiuj grave kontribuis al tio, ke multaj ĵurnalistoj, radio- kaj televid-raportistoj kaj Esperanto-amikoj el la tuta mondo vizitis Herzberg kaj konatiĝis kun la urbo, la regiono kaj Germanio.

Daŭrigo de Esperanto-aktivadoj
Dankante, Zsófia Kóródy diris, ke ŝia pli ol dudekjara laboro por la Esperanto-Centro estis samtempe laborado ankaŭ por la urbo Herzberg kaj por la internacia uzado de Esperanto. Ŝi emfazis, ke tiu meritkruco estas kompreneble ankaŭ por ĉiuj, kiuj dum tiuj jardekoj aktive kunagadis, ja sen la subteno de klubanoj, membroj, lokaj kaj regionaj agadantoj, sen GEA kaj pluraj internaciaj organizaĵoj, projektpartneroj ne estintus eble tiom da faroj kaj rimarkeblaj rezultoj por Esperanto kaj en Herzberg am Harz kaj en la mondo. Ŝi certigis ĉiujn, ke ŝi volonte daŭrigos siajn vastajn Esperanto-aktivaĵojn.

Agnosko ankaŭ por Esperanto
Tiu speciala ŝtata ordeno signifas gravan agnoskon de la valoroj de Esperanto kaj de la ĝisnunaj laboroj per tiu lingvo. Estas rimarkita kaj aprezata la vasta uzado de Esperanto en Herzberg kaj en la regiono en videblaj, publikaj lokoj en formo de monumentoj, loknomoj, vojmontriloj, klarigtabuloj ĉe turismaj vidindaĵoj; estis perceptitaj kaj alte taksataj la edukado por paco, popola interkompreniĝo kaj ĝemelurbaj kontaktoj, la engaĝo de lernejanoj, de membroj de aliaj kluboj kaj asocioj, la internacia kulturpera rolo de la lingvo per kantoj, teatraĵoj, ekspozicioj, la konstantaj agadoj por la Esperanto-biblioteko kaj muzeo.

DR Kongo
Esperanto vivas en DR Kongo de pli ol jarcento, pli precize ekde 1905 laŭ la libro *Afero de Espero* de Heidi Goes. Tiam okazis kursoj, sed ne mankas sufiĉe da informoj pri ili. En la sesdekaj jaroj kreiĝis la landa asocio en DR Kongo, DKEA, Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio, poste la junulara asocio, DKEJO, Demokratia Kongolanda Esperanta Junulara Organizo. Tamen ankoraŭ mankas informoj pri tio, ĉar verdire, multaj kongolandaj esperantistoj nenion scias pri la unuaj tagoj de Esperanto en DR Kongo. Iam estis eldonitaj Esperanto-lernolibroj en lokaj lingvoj, la revuo *Vekiĝo*, Jarlibro, sed multaj ne konas ilin, ĉar ne ĉiuj havis aliron al interreto tiam. En novembro 2023, la junulara organizo DKEJO starigis laborplanon kaj emfazis la bezonon eldoni revuon kiu estu utila al ĉiuj kongolandanoj kiel informilo pri ĉiuj aspektoj de la kongolanda movado, jen kiel *Konga Stelo* naskiĝis[11].
Komence, ni decidis, ke la revuo estu dulingva, sed tio ne eblis ĉar en DR Kongo estas 4 naciaj lingvoj, kiujn ne ĉiuj scipovas, kaj ni ne volis uzi la

[11] https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo

oficialan lingvon, la francan, ĉar ni ŝatus promocii kongolandajn lingvojn. En ĉiu numero aperas Esperanto-kurso pri la svahila, unu el la naciaj lingvoj. Por igi nian revuon interesa, ni elektis kelkajn temojn pri la movado, kulturo, naturo, amuzaj rakontoj, anekdotoj, poemoj, leciono pri unu el la naciaj lingvoj, petoj pri korespondado kaj diversaj aferoj, ekzemple nekrologo. Efektive, *Konga Stelo* estas disponebla por ĉiuj kongolandanoj kiel informilo kaj lingvoekzerca ilo, en la senco, ke ĉiu rajtas praktiki skribadon kaj sendi al ni sian skribaĵon aŭ artikolon.

Joel MUHIRE, redaktoro de Konga Stelo

Serbio

Inkluziva retkursaro en Serbio

Aranka LASLO kaj Nedeljka LOŽAJIĆ (Loĵajiĉ) en siaj diplomlaboraĵoj por la unujara Instruista trejnado en Poznano pristudis la ĝisnunajn spertojn el la diversnivelaj kaj diversfokusaj retaj kursoj de Esperanto en Serbio dum la antaŭaj du jaroj, kiuj estis inkluzivaj por vidantoj kaj nevidantoj, organizitaj de Serbia Esperanto-Ligo (SEL), respektive ĝia Instruista sekcio, kiu funkcias ankaŭ kiel landa sekcio de ILEI (ILEI-RS). La rezulto estas, unuavice, ke SEL nun havas du novajn diplomitajn instruistojn de Esperanto, sed ne nur tio.

Enketante por siaj diplomlaboraĵoj Aranka kaj Nedeljka celis analizi la spertojn kaj impresojn de la kursanoj kaj de la kursgvidantoj, kaj sekve proponi plibonigojn por la venonta eldono de la kursaro. Tiel ILEI-RS kun la du instruistinoj kontribuas al la laŭstatuta tasko de ILEI: atenti, esplori kaj analizi pedagogiajn problemojn en la lingvo-instruado kaj labori por solvi ilin.[12] La ĉefa pozitiva konkludo de la enketoj estas, ke la inkluziveco de la kursoj ne nur pliriĉigis konversaciajn temojn kaj kreis stimulajn parol-situaciojn, sed ankaŭ kreskigis la komprenon de vidantoj pri la problemoj kaj bezonoj de nevidantoj, kaj stimulis la solidarecon kaj reciprokan helpon precipe pri teknikaj problemoj de retaj kursoj kaj transprenado de kursmaterialoj, kiujn necesis studi eksterklase, prepare por venonta instruhoro.

Tamen, specife ĉe la kursoj por komencantoj oni konstatis, ke estus pli facile organizi kaj sekvi la instruadon aparte kun blindaj kaj kun vidantaj kursanoj. Sekve, ĉi-jare okazos du apartaj kursoj por komencantoj, kiujn gvidos Aranka LASLO kaj Živanko (Ĵivanko) NOVAKOV por vidantoj, kaj Nedeljka LOĴAJIĈ kaj Ĵivanko NOVAKOV por blinduloj. Por varbi kursanojn, aldone al

[12] https://www.ilei.info/dok/2014-01-01%20%20Statuto%20kun%20Interna%20Regularo.pdf, punkto 4.2.

afiŝoj kaj anoncoj tra sociaj retoj kaj retlistoj, SEL aperis en la Beograda Librofoiro kun vendekspozicio de Esperantaj kaj priesperantaj libroj, kie kelkaj vizitantoj aliĝis al la komenca retkurso.
Tri progresigaj kursoj – konversaciaj ekzercoj A2-B1 kun Nedeljka LOĴAJIĈ, konversacia kurso B2-C1 kaj kurso pri gramatiko de Esperanto kun Radojica PETROVIĈ – por vidantoj kaj nevidentoj kune, anoncitaj internacie tra sociaj retoj, retlistoj kaj alivoje, altiris aliĝantojn el diversaj mondopartoj, de Brazilo tra Eŭropo kaj Afriko ĝis Koreio. Tradukekzercojn por parolantoj de la serba gvidos Ĵivanko NOVAKOV. La 12-hora prelegaro de Zlatoje MARTINOV pri literaturo de Esperanto havas pli ol 70 aliĝintojn el la tuta mondo kaj okazos ĉiun duan lundon po unu horo. La ceteraj kursoj okazos unu aŭ du horojn semajne, ekde novembro ĝis aprilo, per la platformo Zoom.

Radojica PETROVIĆ

UNESKO kaj Esperanto

Okaze de la 70-jara jubileo de la Montevidea Rezolucio

de Henri MASSON (Francio)

Lanĉita en 1887 de la pola okulisto Ludwik Lejzer Zamenhof, Esperanto rapide progresis, kun la organizo en 1905 de sia unua universala kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio). UEA (Universala Esperanto-Asocio), fondita en 1908, havis rapide milojn da membroj kaj centojn da delegitoj. Ekde la fondiĝo de la Ligo de Nacioj en 1919, deko da landoj (reprezentantaj duonon de la monda loĝantaro) rekomendis la instruadon de Esperanto; Ĝenerala Vicsekretario Inazô Nitobe verkis favoran raporton en 1921, sed precipe Francio kontraŭis ĝin.

En 1949, sekve de iniciato de UEA, 500 organizoj kaj 900 000 individuoj el 76 landoj subskribis peticion invitantan Unuiĝintajn Naciojn disvolvi Esperanton kaj kuraĝigi ĝian instruadon. Sed en 1954, la ĝenerala konferenco de Unesko en Montevideo (Urugvajo) unue malakceptis tiun ĉi rezolucion, antaŭ ol akcepti, danke al la insisto de Ivo Lapenna (jugoslava tiam brita juristo) kaj la subteno de la loka loĝantaro, iomete alian rezolucion:

Rezolucio adoptita la 10-an de decembro 1954, ĉe la dekoka plenkunsido.
IV.1.4.422 – La Ĝenerala Konferenco,
Post diskuto de la raporto de la Ĝenerala Direktoro pri la internacia peticio favore al Esperanto (8C/PRG/3),

IV.1.4.4221 – Notas la rezultojn akiritajn per Esperanto en internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimiĝo de la popoloj;
IV.1.4.4222 – Notas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;
IV.1.4.4223 – Notas, ke pluraj Membro-Ŝtatoj deklaris sin pretaj enkonduki aŭ disvolvi la instruadon de Esperanto en siaj bazlernejoj, mezlernejoj aŭ superaj lernejoj, kaj invitas tiujn Membro-Ŝtatojn informi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj akiritaj en ĉi tiu domajno;
V.1.4.4224 – Rajtigas la Ĝeneralan Direktoron sekvi spertojn pri la uzado de Esperanto por edukado, scienco kaj kulturo kaj kunlabori tiucele kun Universala Esperanto-Asocio en la kampoj de intereso de ambaŭ organizaĵoj.

La rezolucio per si mem ne estis io grandioza, sed Lapenna kapablis uzi ĝin, precipe interne. La esperantistaro atendis jam de multe da tempo ian agnoskon de la „ekstera mondo". Pro tio William Auld tuj dediĉis sian ĉerverkon *La infana raso* al la „triumfinto de Montevideo", Ivo Lapenna.

Vidu la foton de la Plenkunsido 10.12.197 sur la paĝo 258 de *Historio de Esperanta literaturo* de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer.

Sona registrado de la akcepto de tiu rezolucio estas en la disko III de diskoservo dediĉita al Ivo Lapenna, eldonita de Fondaĵo Ivo Lapenna www.ivolapenna.org.

Parolas pri la evento Carlo Minnaja en la 22-paĝa artikolo „Konscio, racio kaj emocio", H. Tonkin en „De Montevideo al Sofio - Esperanto antaŭ Unesko kaj Unesko antaŭ Esperanto" kaj Lee Chong-Young „Esperanto en la 21a jarcento", Korea Esperanto-revuo, 2001.

Oni longe festis la datrevenojn de la Montevidea Rezolucio. Kial oni ne plu faras tion nun? Ni konsideru, ke oni parolis pri „Montevidea renesanco" danke al la decido de Unesko kaj al la atribuo al UEA de la konsultaj rilatoj. Al ĉi tio sekvis la granda sukceso de la UK en Bolonjo en aŭgusto 1955.

En la 1970-aj jaroj la instruado de Esperanto en lernejoj grandparte disvolviĝis sub la gvido de la hungara filologo István Szerdahelyi. En 1977, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis siavice akceptita partnero kun Unesko, en kategorio C (UEA estas en kategorio B).

Samjare la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow, iris al Rejkjaviko (Islando), invitite de UEA, por paroli antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto. La *MacBride Report* (1980) atentigis pri la

problemo de komunikado, sed la Monda Komunika Jaro (1983) povus esti pli koncentrita pri lingvaj aspektoj.

Nur en 1985, pro iniciato de la esploristo Tibor Sekelj (civitano de la jugoslava mondo de hungara deveno), Unesko adoptis la **duan rezolucion** favoran al Esperanto. Temas pri la **Rezolucio adoptita la 8-an de novembro 1985**, ĉe la tridek sesa plenkunsido en Sofio (Bulgario).

11.11 – Festo de la centjariĝo de la kreado de Esperanto. La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, ĝi per sia rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn akiritajn pere de tiu ĉi internacia lingvo, kiu estas Esperanto, laŭ intelektaj interŝanĝoj, internaciaj normoj kaj interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke ili kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorante, ke Esperanto de tiam multe progresis kiel instrumento de interkompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plej multajn regionojn de la mondo kaj la plej multajn homajn agadojn,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto proponas por internacia kompreno kaj komunikado inter diversnaciaj homoj,

Rimarkante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigo de informoj pri la agado de Unesko, kaj ankaŭ de ĝia partopreno en tiuj ĉi agadoj,

Konsiderante la fakton, ke en 1987 oni celebros la centjaran jubileon de la kreado de Esperanto,

1. Prezentas sian gratulon al la esperantista movado okaze de ĝia centjariĝo;

2. Petas la Ĝeneralan Direktoron daŭre zorge monitori la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter diversaj nacioj kaj kulturoj;

3. Invitas la Membro-Ŝtatojn festi la centjaran jubileon de Esperanto per taŭgaj dispozicioj, deklaroj, specialaj numeroj de poŝtmarkoj kaj aliaj, kaj antaŭenigi la enkondukon de studprogramo pri la problemo de lingvoj kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj superaj edukadaj establoj;

4. Rekomendas, ke internaciaj neregistaraj organizaĵoj asociiĝu kun la celebrado de la centjariĝo de Esperanto kaj studu la eblecon uzi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive pri la agado de Unesko.

De la 25-a ĝis la 27-a de novembro 1985 Unesko financis tritagan konferencon en sia ejo (ĉambro VI) pri Plurlingveco kaj komunikado,

organizitan de Universala Esperanto-Asocio, kies Aktoj estis eldonitaj en 500 ekzempleroj (inkluzive 25 por Unesko).

Dum ceremonio inaŭguranta la centjariĝon de Esperanto, la 16-an de decembro 1986, la Premio Zamenhof estis aljuĝita al Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de Unesko.

En la 1990-aj jaroj Unesko redifinis siajn partnerec-kriteriojn kaj multaj Neregistaraj Organizoj estis forigitaj el la listoj, ĉu ĉar ili ne sufiĉe kunlaboris kun Unesko, ĉu ĉar ili ne estis sufiĉe internaciaj, precipe apenaŭ ĉeestantaj en Afriko. Universala Esperanto-Asocio savis sian partnerecon, sed Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) perdis ĝin. Tamen, ILEI daŭre estis regule invitata al Ĝeneralaj Konferencoj kaj aliaj Unesko-aranĝoj, ĉe kiuj ĝi ĉeestas asidue.

Afriko longe estas malforta punkto por Esperanto, kvankam Tibor Sekelj, en la 1980-aj jaroj, rekomendis organizi tie Universalan Kongreson de Esperanto. Dum iom pli ol dek jaroj Esperanto konsiderinde kreskis en Afriko, precipe danke al Mireille Grosjean, tiama prezidanto de ILEI. En 2008 okazis en Benino la internacia ILEI-Konferenco, kaj en 2017 la Internacia Junularo Kongreso (IJK) en Togolando.

TEJO, Tutmonda Organizo de Esperantista Junularo, junulara sekcio de UEA, akiris sian aŭtonomion en 2017 por disvolvi siajn proprajn partnerecojn. Tiel ĝi petas (same kiel ILEI) (re)fariĝi partnero de Unesko.

En 2000, UEA grave kontribuis al la subskribo de la „Manifesto 2000 por kulturo de paco kaj senperforto".

En 2008, la jaro de la lingvoj, esperantistoj helpis traduki la inaŭguran mesaĝon de Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, en grandan nombron da lingvoj.

La 15-an de decembro 2008, kiam proksimiĝis la 150-a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Lejzer Zamenhof, UEA organizis kun la delegacioj de Pollando kaj Litovio en la Unesko-Domo (Ĉambro II) asembleon kun la titolo: „Esperanto, justa lingvo".

Unesko estis asociita kun la 100-a datreveno, en 2017, de la morto de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kaj gastigis en sia ejo (ĉambro II), la 11-an de decembro 2017, laŭ peto de Pollando, **simpozion** kun la titolo: „Tutmondiĝo, Interreto, Poŝto de Unesko: kie estas Esperanto cent jarojn post la morto de Zamenhof?" La Aktoj de ĉi tiu konferenco devus esti publikigitaj baldaŭ.

La publikigo en Esperanto de la **Unesko-Kuriero**, en 2017, produktita de Trezoro Huang Yinbao, estas grava evento en la Esperanto-movado. UEA ankaŭ entreprenas la tradukon al Esperanto de la libro: *De ideoj al agoj, 70 jaroj de Unesko*. Krome, en sia „Serio Oriento-Okcidento", UEA jam aŭspiciis en Esperanto 63 majstrajn verkojn el multaj mondkulturoj.

Hodiaŭ UEA aktive kunlaboras kun Unesko, parolante en Ĝeneralaj Konferencoj kaj partoprenante en la organizado de forumoj (forumo 2020 pri tutmonda civitaneco precipe), kaj ankaŭ en la festivalo pri paco (2020) organizita de la NGO-Konferenca Komitato de Unesko. Unu el ĝiaj kvar laborlingvoj estas Esperanto.

UEA kunlaboras pli ĝenerale kun Unuiĝintaj Nacioj, kaj estis elektita en 2018 kiel membro de la Buroo de CoNGO (Konferenco de NRO-oj havantaj konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj), kie ĝi estas reprezentata de Humphrey Tonkin. La temoj de niaj mondkongresoj estas elektitaj konforme al la temoj de la internaciaj jaroj de Unuiĝintaj Nacioj. Nia universala kongreso de Montrealo, Kanado, (1-a ĝis 8-a de aŭgusto 2020) havis la temon: „75 jaroj de Unuiĝintaj Nacioj: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo".

La Tago de la 70-a datreveno de mondcivitanoj, organizita de la asocio Pangée NGO, okazis ĉe Unesko la 20-an de novembro 2018 sub la patroneco de Unesko, kaj Esperanto tie estis bone reprezentita.

Esperanto estas en la nacia listo de la **nemateria kultura heredaĵo** de la homaro de Pollando ekde 2014, kaj en tiu de Kroatio ekde 2019. UEA kaj la esperantistaro ĝojus, se aliaj landoj donus la saman prestiĝan rekonon al Esperanto.

APENDICOJ
Parolado de Amadou Mahtar M'Bow - Rejkjaviko, julio 31, 1977
Parolado de Amadou Mahtar M'Bow - Parizo, la 16-an de decembro 1986
Mesaĝo de Audrey Azoulay - la 29-an de julio 2018
Interveno de Rakoen Maertens – la 6-an de novembro 2017

Rilataj dokumentoj en: www.ipernity.com/blog/32119/4729656.

Pasinteco kaj estonteco de la Esperanto-kursoj en UNED

Komenciĝas la lernojaro 2024-2025 kaj ankaŭ la sepa eldono de la kursoj de Esperanto okazantaj en UNED (*Universidad Nacional de Educación a Distancia* aŭ Hispana Nacia Distanca Universitato) per interkonsento kun Hispana Esperanto-Federacio. Indas fari bilancon de la atingoj kaj proponojn por plua disvolvado, des pli ĉar ni (la instruistoj) ĝis nun ne sufiĉe informis pri nia agado. Unue, necesas meti la kursojn en ilian kuntekston. Jen la nombro de niveloj kaj studentoj por ĉiuj 16 lingvoj instruataj en UNED dum la nun finiĝanta lernojaro 2023-24[13]:

Lingvo	Niveloj	Studentoj	Procento
Esperanto	2: A2, B1	28	0,37%
Nederlanda	2: A1, A2	43	0,57%
Galega	5: A1, A2, B1, B2, C1	65	0,85%
Ĉina	4: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2	79	1,04%
Rusa	8: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2, B1.1, B1.2, B2.1, B2.2	129	1,70%
Japana	4: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2	132	1,74%
Kataluna-valencia	4: A2, B1, B2, C1	142	1,87%
Eŭska	5: A1, A2, B1, B2, C1	154	2,03%
Araba	4: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2	197	2,59%
Hispana gestlingvo	4: A1, A2, B1.1, B1.2	256	3,37%
Hispana	5: A1, A2, B1, B2, C1	?[14]	?
Portugala	5: A1, A2, B1, B2, C1	272	3,58%
Germana	4: A1, A2, B1, B2	418	5,50%
Itala	6: A1, A2, B1, B2, C1, C2	563	7,40%
Franca	6: A1, A2, B1, B2, C1, C2	1086	14,28%
Angla	6: A1, A2, B1, B2, C1, C2	4039	53,12%
Sumo		7603	100,00%

Tuj videblas ke Esperanto estas la plej malgranda lingvo, sed ankaŭ rimarkeblas ke la angla akaparas pli ol duonon de ĉiuj studentoj. Fakte, ĉiuj lingvokursoj de UNED estas deficitaj krom tiuj de la angla, kiuj pagas la kostojn por la instruado de la aliaj lingvoj. Kiel publika tuthispana

[13] Mi dankas la kunordiganton kaj A2-instruiston Félix Jiménez Lobo pro la datenoj.

[14] Ne eblis ricevi datenojn pri la kursoj de la hispana lingvo por enmigrintoj.

universitato, UNED ne konsideras nur la ekonomian profiton, sed elektas instrui multajn lingvojn pro prestiĝo.

Ĉu tio signifas, ke niaj kursoj estas sekuraj? Ne vere: ni memoru, ke ili estas la malplej popularaj. Plie, dum nuntempe neniu dubus, ke la kataluna, la galega aŭ la gestlingvoj estas veraj lingvoj, plu restas homoj, kiuj principe malsimpatias al Esperanto pro la plej diversaj antaŭjuĝoj. Se unu tia homo fariĝus direktoro de la lingvocentro, tre facilus forbalai niajn kursojn el la listo sub la facila preteksto de la kostoj. Fakte, la tondado jam komenciĝis en la kategorio de „duon-ĉeestaj" kursoj, tiuj kombinantaj retan memlernadon kaj ĉeestajn lecionojn en la „alligitaj centroj" (*centros asociados*): 13 niveloj de diversaj lingvoj perdis tiun eblon por la kurso 2024-25, kaj duonĉeestaj kursoj tute malaperis por la kataluna, la galega kaj la hispana mem. Ankaŭ mia propono okazigi duonĉeestajn Esperanto-kursojn en la UNED-centro en Barcelono estis rifuzita.

La tendenco en la nombro de aliĝantoj denove ne favoras nin:

Lernojaro kaj nivelo	Aliĝintoj	Ekzamenitoj	Sukcesintoj
2018-19 (A2)	63	20	16
2019-20 (A2)	28	7	6
2020-21 (A2)	*26*	*13*	*12*
2020-21 (B1)	*22*	*11*	*10*
2020-21 (Sume)	**48**	**24**	**22**
2021-22 (A2)	*23*	*3*	*3*
2021-22 (B1)	*20*	*8*	*7*
2021-22 (Sume)	**43**	**11**	**10**
2022-23 (A2)	*17*	*5*	*5*
2022-23 (B1)	*13*	*7*	*7*
2022-23 (Sume)	**30**	**12**	**12**
2023-24 (A2)	*19*	*7*	*6*
2023-24 (B1)	*10*	*2*	*2*
2023-24 (Sume)	**29**	**9**	**8**

La unua jaro estis escepta, ĉar multaj esperantistoj aliĝis nur por apogi la iniciaton, sed post la unua jaro de la kurso B1 la nombro de aliĝintoj kaj sukcesintoj ne ĉesis fali. Se la tendenco daŭros, mi timas ke ĉi tiu lernojaro povos esti la lasta. Por ĉi tiu aliĝoperiodo necesas celi minimume 40 aliĝontojn por la sumo de ambaŭ kursoj, kiu estos nombro komparebla kun la kursoj por la nederlanda, lingvo simila laŭ populareco kaj nombro de niveloj (2). Tial mi sincere kredas, ke **la kresko estas la sola vojo al pluvivo de niaj kursoj en UNED**, la solaj universitataj distancaj kursoj de Esperanto en la tuta Eŭropo kaj eble la tuta Okcidento.

Pluraj strategioj povas utili por tiu celo. Unue, necesas aktive reklami en ambaŭ direktoj: internen en la movadon, kie multaj izolitaj komencantoj ne emas membriĝi en asocioj, kaj eksteren, en la ĝeneralan publikon. Tio nepre signifas investi monon en reklamadon, ĉefe en Interreto. Kiel antaŭe (kaj ankoraŭ nun) faras revuoj, eĉ movadaj retejoj kiel Eventa Servo disponigas ekran-spacon al reklamantoj kontraŭ pago, ofte kun la eblo precizigi kaj limigi ĝin al iu difinita urbo, regiono aŭ lando, kaj tia reklamado fakte estas la sola enspezo de ĵurnalaj retejoj kaj sociaj retoj. La mono por aktiva reklamado jam ekzistas: dum HEF pagas al la instruistoj de la kursoj 75% el la mono transdonata de UNED, ĝi retenas la ceterajn 25%, kiujn pasintjare sumis 1292 €. Tiu resto devus esti reinvestata en la kursojn de UNED per reklamado, se ne tute, almenaŭ parte. Neniu uzo pli konvenas al la celoj de la asocio ol varbi novajn esperantistojn kaj novajn asocianojn per la kursoj de UNED, kaj en la ĵus okazinta 82-a Hispana Kongreso de Esperanto en Ĉeste mi ĝojis per la unua fojo renkonti kvar el miaj lernintoj, nun tre aktivajn esperantistojn. Enmovadigi la lernantojn ĉiam estis mia prioritato kiel instruisto, kaj mi pensas, ke ni estas sufiĉe sukcesaj tiurilate, kompare kun tradiciaj kursoj en lokaj kluboj, kie la lernantoj apenaŭ ricevas ŝancon paroli la lingvon. Kvankam UNED zorgas ĉefe pri la nombro de aliĝintoj kaj ne tiel multe pri la nombro de sukcesintoj, por ni ambaŭ estas gravaj.

Due, por varbi apogon inter jam lertaj esperantistoj, necesas pli diskonigi la eblon aliĝi nur al ekzameno anstataŭ al la tuta kurso por ricevi diplomon de UNED kontraŭ 75 €. Tiurilate, HEF devas lerni la lecionojn de UEA, kiu tre sukcesis popularigi la KER-ekzamenojn en la movado, tiel ke aliĝo kaj studo por tiuj ekzamenoj fariĝis kvazaŭ sporto malgraŭ la kosto de la kotizo (82 € por KER-ekzameno B1, en la kazo de hispanoj). Kvankam la diplomoj de UNED aŭtomate konvertiĝas al kreditoj nur por studentoj de UNED mem, manko de ekstermovada agnosko ne malhelpis la populariĝon de UEA-KER-ekzamenoj, ĉar de somero 2022, kiam UEA komencis okazigi pure retajn KER-ekzamenojn, ĝia tuta sistemo dekupliĝis de la lingvocentro ELTE Origó en la hungara universitato Eötvös Loránd kaj nun liveras diplomojn nur kun sigeloj de esperantaj organizoj ne konataj kiel edukaj instancoj ekster la movado. Dum unu el miaj lernintoj sukcesis agnoskigi sian ĉeestan KER-diplomon kiel meriton danke al la sigelo de Origó kiam ŝi enposteniĝis kiel funkciulino, alia ne sukcesis ricevi laboran forpermeson por la ekzameniĝo ĉar lia diplomo jam estis agnoskita nur de UEA kaj ILEI. De 2022 la diplomoj de UEA kaj UNED staras sur la sama nivelo: neniu instanco devas akcepti ilin aŭtomate kaj devige, pro reciproka dupartia interkonsento, sed nur laŭvole, depende de la fidindeco kaj konateco de la subskribinta

institucio. Tial, granda ŝtata universitato kiel UNED havas avantaĝon, almenaŭ en Hispanujo, kaj indas diskonigi la diplomojn de UNED kiel alternativon al la ekzamenoj de KER. La celo ne estas „konkuri" kun UEA, sed ĉefe kreskigi la valoron de Esperanto por la estroj de UNED.

Trie, necesas ne forgesi la eblojn kreski ankaŭ ekster Hispanujo. La nuna panoramo de internaciaj retaj Esperanto-kursoj ŝanĝiĝas kaj malfermas ŝancojn. Duolingo jam fermas sian kurson por hispanlingvanoj, kiu markis tutan epokon de kresko por nia lingvo. La bezono de anstataŭantoj tiel sentiĝas, ke Londona Esperanto-Klubo starigis tutan retan lernejon kun kvar niveloj kaj naŭ instruantoj. La saman ondon rajdas la kurso de Kolombia Esperanto-Ligo, kiu jam nun per la kvina fojo promesas konduki komencantojn de nulo al B1 ne en du jaroj sed... en nur du monatoj. Pro scivolemo, pasintjare mi aliĝis kiel studento kaj rimarkis ke, ironie, la instruantoj bazis la tutan kurson sur preparado por la KER-ekzameno je nivelo B1, emfazante ke ĝi estas „oficiala", ĉar ĝin organizas hungara universitato, montrante malaktualajn dulingvajn ekzamenmodelojn kaj eĉ komentante la hungaran ortografion. Samtempe, ili ankaŭ emfazis la eblojn profesiiĝi kaj perlabori sian panon per Esperanto, dum ilia propra kurso plu estas senpaga kaj ekonomie nedaŭripova, ĝis la punkto ke en 2021 UEA konvinkis HEF'on donaci 1000-eŭran subvencion al KEL por tiu kurso. De mia vidpunkto, ili havos ŝancon profesiiĝi nur, se la kursoj en UNED tiel kreskos, ke HEF dungos ilin (kaj nur se HEF kontentos pri ilia profesia kapablo).

Estas vero ke, bedaŭrinde, pure retaj ekzamenoj faritaj dum la KOVIM-pandemio restis eksperimento kaj ke UNED denove postulas ĉeestajn legoskribajn ekzamenojn (la aŭda kaj parola partoj estis ĉiam retaj). Teorie tio malhelpus internaciiĝon de la kursoj. Tamen, UNED havas centrojn kaj ekzamenejojn en Bonaero, Karakaso, Limo, Meksikurbo, Bogoto, Kito, Santiago de Ĉilio kaj Malabo, kie sufiĉe motivigitaj studentoj povus ekzameniĝi. Nek hispana civitaneco nek iu ajn diplomo aŭ edukiteco estas postulata por studi lingvojn en UNED: nur aĝi 16 jarojn aŭ pli. Se UEA volas disvastigi Esperanton en Latinameriko, anstataŭ subvencii amatorajn iniciatojn, ĝi subvenciu latinamerikajn aliĝojn al kursoj de UNED, parte aŭ tute (sed aposteriore kaj sub kondiĉo trapasi la finan ekzamenon!). Ĝi kontaktu latinamerikajn asociojn por diskonigi la kursojn kaj petu disvastigon de la anonco de subvencioj; se la mono ne sufiĉos por ĉiuj petintoj, eblas okazigi konkurson aŭ loterion.

Laste, ni ne subtaksu la eblon kreski ankaŭ ekster la hispanlingva teritorio. La hispana lingvo estas la plej studata en la mondo post la angla, franca kaj ĉina, kaj abundas multlingvuloj jam posedantaj la hispanan kaj scivolemaj pri Esperanto. Ekster hispanlingvaj landoj UNED disponas ekzamenejojn en Novjorko, Seatlo, San-Paŭlo, Lisbono, Oporto, Londono, Parizo, Bruselo, Berlino, Berno, Frankfurto, Munkeno, Romo, Varsovio kaj eĉ Albanio. Aliflanke, multaj poliglotoj lernas lingvojn kiel sporton kaj ne bezonas atestilojn, tiel ke la kampo por kresko povas esti eĉ pli vasta (unu fojon mi havis aŭstralian studenton); memoru ke UNED-burokratoj zorgas pri aliĝokotizoj pli ol sukcesaj ekzameniĝoj. Por tiaj memmotivigitaj lernantoj la vera problemo ne estos neeblo ekzameniĝi, sed nur la hora diferenco, kiu malhelpos partoprenon en videkonferencoj por parola praktiko. La klarigoj kaj lernomaterialoj de la kurso B1 estas tute en Esperanto; plie, la retejo kaj la virtuala kursejo de UNED havas anglalingvan interfacon, kaj ĉiuokaze nuntempaj retumiloj disponigas aŭtomatan tradukadon al multaj aliaj lingvoj. Laŭ mia sperto, la sola paĝo, kiun mi ne sukcesis traduki aŭtomate, estis la aliĝilo mem; nur tie HEF devus provizi aliĝantojn per lingva helpo kaj instrukcioj.

Resume, ĉu esperantistoj konscios, kian atuton ni havas en UNED, antaŭ ol ĝi malaperos?

Rubeno Fernández ASENSIO
Instruisto de konversaciaj klasoj por niveloj de EO A2 kaj B1 en UNED

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia nova arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2024,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2025.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*
TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Aime-Patrick Manirakiza**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
kaj aliaj

(daŭrigo sur p. 55.)

Alvoko partopreni en la 58-a ILEI-Kongreso kaj Simpozio

Tempo: Ekde la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025

Loko: Beogrado, Serbio

Ĉef-temo de la Kongreso: „Artefarita Intelekto kaj Lingvolernado”

Retejo de la Kongreso: https://2025.kongreso.org/.

ILEI ĉiujare okazigas gravegan kongreson por ni instruistoj, ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de aliaj lingvoj kaj fakoj. Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado, kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de kiu ajn lingvo-nivelo

En 2025, la 58-a Kongreso de ILEI denove okazos hibride: virtuale kaj ankaŭ ĉeeste en la interesa urbo Beogrado (Serbio).

La ĉefa temo de la Kongreso estos: „Artefarita Intelekto kaj Lingvolernado”, kaj certe ĝi vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de instruistoj de aliaj lingvoj kaj fakoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin aŭ interesiĝas pri la temo, aŭ ĝenerale pri pedagogio.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuaĵojn pri la kongresa aŭ aliaj pedagogiaj temoj, kaj ankaŭ por la Lingva Festivalo, la Internacia Vespero aŭ aliaj programeroj. Vi povas indiki viajn kontribuojn por nia programo per la aliĝilo (https://2025.kongreso.org/alighilo.php) kaj/aŭ per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendi ilin estas la 31-a de marto 2025, por ke ili estu aldonitaj al la Kongresa Programo. Por ĉiu via propono, ĉu prelego aŭ alispeca kontribuaĵo, bonvolu sendi al ni (ilei.kongresoj@gmail.com):

1. la titolon de la kontribuaĵo;
2. vian kompletan nomon;
3. daŭron de la prezentado;
4. ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete;
5. du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo;
6. du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi;
7. vian foton.

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn ktp. Vi trovos ĉiujn detalojn pri aliĝo en la kongresa retejo: https://2025.kongreso.org. La ĉefa temo de la ĉi-jara **ILEI-Simpozio**, estos la sama kiel de la kongreso**.** Venu plibeligi nian kongreson per via ĉeesto kaj aktiva agado. Via partopreno estas tre grava. Bonvenon!

Laura BRAZZABENI
ILEI-Estrarano pri kongresoj

Beogrado atendas vin en 2025!

Ĉu vi pretas malkovri Beogradon? En 2025, la ĉefurbo de Serbio unuafoje gastigos la kongreson de ILEI! Beogrado, facile atingebla per aviadilo kaj per speciala busservo el Brno (kie la antaŭan semajnon okazos la Universala Kongreso), invitas vin malkovri ĝian riĉan kulturon, historian gravecon kaj gastamon.

Pri Beogrado
Lokita ĉe la pitoreska kunfluejo de la riveroj Sava kaj Danubo, Beogrado estas unu el la plej antikvaj urboj de Eŭropo, kun historio komenciĝanta jam en la 4-a jarmilo a.K. La urbo, fondita de la keltoj kaj konata kiel la romia Singidunum, hodiaŭ brilas kiel la edukada, kultura kaj industria centro de Serbio, kun pli ol 1,5 milionoj da loĝantoj.





Beogrado plenas je unikaj allogaĵoj, inkluzive de:

- **Kalemegdan** – vasta parko, kie troviĝas la Beograda Fortikaĵo, la fama monumento *La Venkinto* kaj antikvaj urbaj enirejoj.
- **Vinča – Belo brdo** – elstara arkeologia loko, kiu malkovras la vivojn de la prahistoriaj loĝantoj de la regiono.
- **Skadarlija** – bohemia kvartalo kun vivoplena atmosfero, rememoriganta pri tradiciaj artistaj kaj kulturaj renkontiĝoj.
- **La strato Knez Mihailova** – historia piedira zono kaj butikcentro, kie antikvaj kaj elegantaj konstruaĵoj kreas unikan etoson.
- **Muzeoj kiel la Nacia Muzeo kaj la Nikola Tesla Muzeo**, kiuj reflektas la intelektan kaj sciencan riĉecon de la urbo.

Beogrado, kun sia modera kontinenta klimato kaj amika spirito, proponas idealan lokon por nia kongreso. Post la memorinda ILEI-kongreso en Čačak en 2019, ni denove antaŭĝojas bonvenigi vin en Serbio!

La LKK

Aliĝilo

La 58-a Kongreso, Beogrado (Serbio)

26/07 – 02/08/2025

Personaj informoj

Nomo persona: .....
Nomo familia: .....
Sekso: °Ino °Viro
Naskiĝdato: .....
Naskiĝloko: .....
Profesio: .....

Kontaktinformoj

Adreso: .....
Poŝtkodo + Urbo: .....
Lando: .....
Retpoŝto: .....
Telefono(j): .....

Mi ☐ bezonas / ☐ ne bezonas invitilon por peti la vizon.

Se vi aliĝas ĝis la 31-a de decembro 2024, vi ricevos rabaton de 10 eŭroj. (Akompananto kaj Honora Membro aliĝas senpage.)
Kotizo-tabelo kun rondigitaj valoroj en eŭroj:

Aliĝilo:	ĝis 31/03/2025		ĝis 30/06/2025		de 01/07/2025	
Registriĝa kategorio:	A	B	A	B	A	B
ILEI-membro	80	60	95	70	110	85
Ne-membro	105	75	125	85	140	95
Infanoj ĝis 18-jaraj	10	10	10	10	10	10
Junulo, handikapito ktp.	40	30	50	35	60	40
1 aŭ 2-taga partopreno	40	30	50	35	60	40
Nur virtuala partopreno	25	15	30	15	35	20

Kotizoj: ILEI-membro ☐ Handikapito ☐ Akompananto aŭ HM ☐
Partopreno nur virtuala ☐ Familiano ☐ 1 aŭ 2-taga partopreno ☐

Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno _____ foriro _____

Pagado
Aliĝkategorio:

Mi kotizas per € …… Mi kontribuos al ILEI-agado per € ……..

Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago de la kotizo kaj mi pagas jene (indiku vian pagmanieron):

☐ Al la ILEI-konto ĉe UEA ilek-a, indikante „ILEI-Kongreso 2025", kun kopio al ni ilei@kongreso.org

☐ Al la ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, aldonante 5 €; el EU-landoj senkoste.

☐ Por la pagoj el Serbio: Al LKK al dinara bankokonto de la landa asocio „Udruženje esperantista Srbije" ĉe NLB Komercijalna banka AD, 205-0000000422411-63.

☐ Neniu el tiuj ebloj taŭgas por mi, do mi skribas al ilei@kongreso.org pri miaj cirkonstancoj por trovi kune taŭgan solvon por mi.

Kontribuoj al la programo:

Por la Lingva Festivalo mi proponas prezenti la lingvon: .....
Mi kontribuos al la arta vespero per: .....
.....
Aliaj kontribuproponoj por la kongresa programo: .....
.....
Aliaj komentoj, sugestoj, proponoj, manĝpreferoj ktp.: .....
.....

Mi NE konsentas la publikigon de
☐ Nomo ☐ Ŝtato ☐ Retadreso ☐ Telefonnumero

Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Kongresa Regularo, p. 6-9 (https://ilei.info/dok/Konferenca_regularo.pdf)

Loko, dato _____ Subskribo _____

Retejo de la Kongreso kun la reta aliĝilo: https://2025.kongreso.org/

(daŭrigo de la paĝo 48)

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.



Beogrado atendos vin

dum la 58-a ILEI-Kongreso en 2025!

(vd. p. 50)